

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro (25) 1/2007 ★ ISSN 0032-2431



1
2007

Enhavtabelo:

1	<i>Pola Antologio</i> survoje <i>Tomasz Chmielik</i>
2	Apude... <i>Kazimierz Leja</i>
3	<i>Aniara</i> sursceneje en Esperanto <i>Zofia Banet-Fornalowa</i>
5	Esperanto senbaroka <i>Maciej Jaskot</i>
8	Roma Ligocka (pri) <i>Tomasz Chmielik</i>
9	Revemulo <i>Roma Ligocka</i>
15	Zamenhof foriru en Madagaskaron <i>Roman Kurkiewicz (Edward Jaśkiewicz)</i>
17	Zamenhof — pola kuracisto <i>Jan Stanisław Skorupski</i>
17	Kion Zamenhof vere diris al la juda delegacio <i>Doron Modan (Israela Esperantisto)</i>
18	Al kiu gento apartenis d-ro L. L. Zamenhof? (fragm.) <i>Bernard Golden</i>
19	Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto (parto dua) <i>Claude Piron</i>
24	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio EN <i>Czesław Baranowski</i>
26	Akademio de Esperanto — Oficialaj informoj
27	UEA — nia monda organizaĵo <i>Osmo Buller</i>
30	Esperanta ekspozicio en Szczytno <i>Elżbieta Frenszkowska</i>
31	Ago–Semajno 2006 en Nowy Sącz
32	Oblata renkontiĝo en Varsovio <i>Bogusław Sobol</i>
32	La Esperantisto de la Jaro 2006 <i>La Ondo de Esperanto</i>

Tomasz Chmielik

Pola Antologio survoje...

Iom post iom progresas laboro pri *Pola Antologio*. La ideo ĵetita dum la Poznana ARKONES antaŭ du jaroj disvolviĝas kaj vivas. Tio estas por mi des pli ĝojiga, ĉar en Pollando, kie apenaŭ ekzistas la landa asocio de esperantistoj, kie tiuj, kiuj volas ion fari, daŭre riskas dronigi sin en la polan „verdan” inferon de kalumnioj, malpovo, malkapablo organiza kaj decida, kie pli kaj pli firmiĝas la divido je „ni” (moŝtaj paŝtistoj, ĉiam pravaj) kaj „ili” (grego silenta, obeanta humile), kie ĉiuj klopodoj kaj fortostreĉoj por ŝanĝi la netolereblan situacion estas tuj akceptataj kiel insultoj, atako kontraŭ gvidantoj, kontraŭ moŝtuloj, kontraŭ „sanktaj bovinoj”, kiuj alkröĉiĝas al la iluzia regado, kiel dronanto al razoklingo — okazas nur alkröĉiĝado, kaj poste, kiam venas demandoj „kio plu?”, aŭdiĝas responde akuzoj, ofendoj, minacoj.

Do, mi estas feliĉa, ke pri *Pola Antologio* ni kunlaboras ekster ĉio tio, ke ekzistas la celo, kiun ni strebas en vere kolegeca, amika kaj samideana etoso. Mia plej granda zorgo estas nur kapdoloro pro dikiĝantaj volumoj de la estonta *Antologio*. Mi ne supozis en la plej kuraĝaj revoj, ke la proverbaj tirkestoj de tradukantoj enhavas tiom da kaŝitaj perloj, tiom da aperindaj tradukotekstoj.

Nur nun mi havas orientiĝon pri tio, kion oni Esperantigis el la pola literaturo. Samtempe mi konscias, ke atendas nin giganta laboro, ke ankoraŭ estas de-

koj da poemoj kaj centoj da prozopaĝoj tradukotaj. Mi tamen ne perdas esperon kaj estas konvinkita, ke kun helpo de tiel grandiozaj kunlaborantoj, kiel Lidia, Danuta, Dorota, Zofia, Urszula, Adam, Wojtek, Stanisław, Kris... ni efektivigos tiun ĉi taskon.

La antologia laboro havas kvazaŭ tri etapojn. En la unua etapo ni kolektis informojn pri la verkoj jam tradukitaj. (Tamen ni daŭre petas helpon de ĉiuj, kiuj posedas tiajn informojn, ke ili sendu al mia retadreso tchmj@wp.pl mesaĝojn pri la trovitaj tradukoj, ĉu kiel indiko de la fonto, ĉu kiel tekstoj. Tiu helpo estos ĉiam bonvena kaj atendata).


Mi estas leganta ĉiujn verkojn de la pola literaturo kaj ĉiel serĉegas poemojn, prozerojn kaj dramatojn tradukindajn ĉefe laŭ ilia literatura valoro, sed ankaŭ laŭ historia graveco. Ni deziras, ke la esperantista leganto ricevu pli-malpli plenan bildon de la pola literaturo dum jarcentoj. Mi sentas min kiel diligenta studento de pola filologio, senĉese pretiganta sin por la fina ekzameno pri ĉiu epoko. Mi sentas pezon de la respondeco pri tio, ke la *Antologio* estu verko alloga, interesoveka, atentokapta, digestebla. Kaj mi scias, ke la propran noton donos poste legantoj, kiuj vipos nin per kritiko, sed mi forte esperas, ke estos precipe laŭdoj.

En la tria etapo okazas tradukado. Venas tekstoj de la kunlaborantoj, kaj mi estas kontenta, feliĉa, ĉar la tradukoj

surprizas min per freŝeco, inventemo kaj matureco. Por mi restas nur kompili biogramojn de la aŭtoroj, prepari fotojn, kompletigi la biogramojn per ilustra materialo kaj surdiskigi ĉion. La diskojn ricevos Kazimierz, kaj poste li modlu nian paston tiel, ke la bakajo prezentiĝu rave.

En la plej baldaŭaj monatoj ni okupiĝos pri du literaturaj epokoj: Pozitivismo kaj Juna Pollando tiel, ke la volumo estu kompleta aŭtune kaj povu aperi en printempo venontjare. Estus granda revo, ke la kvar ceterajn volumojn ni kompilu ĝis la jaro 2009, kiam la tuta esperantista mondo festos 150 jarojn, pasantaj de la naskiĝo de nia Majstro.

Mi estas konscia, ke prepariĝas io grava, io monumenteca. Kaj kiel dirite, mi estas tre ĝoja, ke troviĝas areto da homoj en la pola Esperantujo, kiuj konkordde, amike, kun plena estimo kaj respekto, laboras kune pri tio, kio naskiĝas ekster apudaj kvereloj, kalumnioj, trompoj, mensogoj, blekado kaj bojado de la aĉuloj, kiuj neniam kapablos formi unu rondon familian kaj kiuj nenion komprenas el la Zamenhofa idearo de unueco, frateco, amikeco malgraŭ obstinaj baroj, kiuj anstataŭ fosi la verdan sulkon, rompas ĉion, kion provas kreskigi aliaj.

Do, mi petas vin, suspektindaj kaj malfidindaj moŝtuloj, nenionfarantoj, blufuloj, ne aldonu al mi la Gombroviĉan „buŝaĉon”, ne faru el mi kverelanton kaj malpaculon. Sen via helpo kaj subteno, kalkulante nur je propraj laboremo, persisto, eltenemo ni postlasos ion, kio restos por longe. Ruliĝu kaj ŝmiru vin en via koto, marĉo, konkuradu per insultoj. Ni estas for de tio, ni bezonas nur „sanktan kvieton” kaj etoson de amika kunagado... 

Kazimierz Leja

Apude...


tamen ne pasive. Kvazaŭ nur observante, sed plene konvinkita pri ĝustaj motivoj kaj celoj, agante por komuna bono. Atendante, kiel disvolviĝos aferoj, *apude* starante, sed plenumante siajn devojn...

Pri kio temas? Parolu pli klare!

Pola Esperantisto eniras sian 5^{an} jaron per malgranda jubileo: la kajero, kiun Vi tenas en siaj manoj estas la 25^a! Kun nova kovrilo, iom renovigita aspekto, espreble ankoraŭ pli interesa enhavo. Ĉio ĉi por Vi, karaj Legantoj.

La kuranta jaro estos ankaŭ la jaro decida pri plua sorto de *Via* revuo. Laŭ interkonsento inter la Eldonejo Hejme kaj PEA pri redaktado kaj eldonado de *PE*, tiu ĉi jaro estas la lasta, se ambaŭ flankoj ne decidis alie. Kun certa scivolemo mi atendas oficialan sciigon pri la termino kaj loko de la ĉi-jara Landa Kunveno de Delegitoj de PEA, dum kiu la afero indas esti pritraktita. Demanditaj kelkaj ĉefestraranoj ĝis hieraŭa tago ne konis la terminon kaj la lokon...

Eĥoj de la likvido de la Esperanta Redakcio de Radio Polonia gastis en la antaŭa n-ro de *PE* kaj plu abundas en Interreto. Medioj informis pri la skandala antisemitismo rilatanta la decidon pri la likvido. Ne mankis en esperantista medio politikaj eldiroj, ne ĉiam favoraj al nia lando kaj reagoj al ili. Tio ne estas kutima en t.n. „neŭtrala” movado. Ĉu en politika realo, ĉu en pola Esperantujo, ĉiam validas unu principo: kiun vi elektas, tiun vi havas...

Do, anstataŭ *apude* stari, ni pli bone elektu! 

Zofia Banet-Fornalowa

Aniara sursceneje en Esperanto

Harry Martinson (1904–1978) — Nobel-premiito el 1974, enhejmiĝis en nian kulturon pere de sia grandioza verko *Aniara* (Aniario), elstare dradukita al Esperanto de William Auld kaj Bertil Nilson, eldonita de Eldona Societo Esperanto Malmö en 1979. Ĝi fariĝis bazo por preparo de spektaklo fare de dramaktoro Jerzy Fornal, kiu ekde 1982 prezentas Esperanto-monodramojn, kadre de sia unupersona Esperanto Teatro ESPERO. Danke al la ĉi-prezento, la mondiskala Esperantistaro havis eblecon konatiĝi kun la verko.

Ĉio komenciĝis de mia vizito en Nörköping la 22^{an} de oktobro 1982. Post la prelego, kiun mi aŭdigis en tiea Esperanto-Klubo, Haldo Vedin pridonacis min per trezoro de monda literaturo, kiun mi konsideras „Aniario”. Survoje el Nörköping al Stokholmo mi avido legis ĉi poemon kaj tuj ekhavis la ideon, ke Jerzy, disponante krom dramartan preparon ankaŭ la pantomimam metion, devas kaj... kapablos ĝin surscenigi. Post konatiĝo kun la verko, Jerzy — plene konvinkita pri ĝia valoro — komencis labori.

Tiel komenciĝis la granda, impresiga arta aventuro de Jerzy kun la *Aniario*. Ne eblis kompreneble surscenigi ĝin en tuteco. Helpis Gunnar Gällmo, kiu elektis la kantojn por la spektaklo. Li ankaŭ pretiĝis glosaron por la programo al la spek-

taklo. Afero tre grava, por kompreni la nefacilan tekston, enhavanta plurajn fakajn vortojn grek-devenajn, ankaŭ inventitajn de la aŭtoro de la epopeo.

La preparo al la prezento de *Aniario* daŭris relative longe. Fine, la poemaro interplektita per moderna muziko de „Tangerine Dream”, daŭranta 45 min., havis en 1987 sian premieron en Svedio kaj Francio.

Stimulis al sukcesa prezento de la nefacila, plena de alegoriaj aludoj poemaro, bona akcepto fare de spektantaro. Gravis tre favora (en la letero al Jerzy) opinio pri la prezento de William Auld, spektanta ĝin dum la 76^a Brita Kongreso de Esperanto en Sheffield, 1992, kiun kun la permeso de la Aŭtoro ni publikigis en la spektakla programo. Pretiĝis ĝin teknike laŭ granda bonvolemo, nia karmemora amiko, dramverkisto Harold Brown. Jen, kion nia eminenta poeto William Auld skribis pri la spektaklo:

...mi aliris vian prezenton kun miksitaj sentoj: ĉu vere iu homo kapablos kapti kaj redoni la esencon de verko tiel potenca kaj simbola? Dubo montriĝis vana. Tiu impresio pri la vastegeco kaj izoleco de la kosmo kaj la senespera sorto en ĝi de la misvojinta homaro, kiu restis en mia animo post la fintraduko — tion vi ne nur kaptis, sed personigis. La lumigo, la kostumo, kaj ne malpleje via velura voĉo

ne nur rekreis en mi la spertitajn sentojn pro la poemo, sed plifortigi ilin. [...] Via interpreto transsentigis la ĝustajn impresojn, tiel ke la ĉirkaŭanta silento de la aŭdantaro plenplenis de streĉa atento. Mi adoris la prezenton...

Ĝojigas kaj stimulas aliaj signoj pri alta, plene komprenema akcepto de la spektaklo. Inter la plej kortuŝaj troviĝas tiu de Lene Niemann, skribita sub impresoj de la spektaklo, prezentita en la Fervoja Klubo de Kopenhago. Jen, kion ŝi notis:

... Superlativoj ne sufiĉas, kiam oni volas priskribi la kunvenon, lunde 17.08.1987 — laŭ la dato ordinara vespero, sed fariĝis grandioza travivaĵo por feliĉuloj, kiuj ĉeestis. Kia prezento! Neniam oni aŭskultis tian esprimriĉecon, tian precizecon, tian voĉon kiel ĉe Jerzy. Ĉiuj estis kaptitaj de la alta arto, kiu plenigis ĉambron, kiam la prezento finiĝis, ni apenaŭ kapablis reveni al la 'ordinara' mondo, sed volis resti en la mondo, kvankam kruela kaj timega, kiun Jerzy kreis antaŭ niaj okuloj. Tre intima estis la travivaĵo, ĉar la 'scenejo' estis tiel malgranda kaj aktoro estis tute proksima al la publiko. Koregan dankon al Jerzy pro tiu elstara vespero... (LEN). [DEFA-Bulteno (Danlando), nro 9, 1987, p. 16].

Grandan travivaĵon por la plenumanto, oni esperu ke ankaŭ por la spektantoj, formis lia prezento de *Aniaro* dum la 88^a UK en Goteburgo, 2003. Tre pozitive, favore aprezita de teatro-recenzintino Marie-France Conde Rey en la *Heroldo de Esperanto*. La ĝisnuna formo de la spektaklo estas riĉigita per filma bildo, surfone de kiu la spektaklo disvolviĝas. Eblis produkti ĝin danke al la financa apogo de la Fako pri Kultura Promociado de la Pola Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj.

Bedaŭrinde, la eksterordinara laŭ enhavo kaj prezento-formo, profunde pensiga spektaklo, daŭre tre aktuala, ne trovis sufiĉan aprezon fare de la organizantoj de la kongreso. Spegulas tion manko de iu ajn recenzo en postkongresa, asocia organo *Esperanto*. Ankaŭ en la jara raporto de UEA, troviĝanta en la sama revuo (6/2004, p. 131–132) ĉapitro pri kulturo, verkita de prof. Humprey Tonkin — respondeculo pri la ĉi-kampa agado de UEA, en la fragmento dediĉita al teatraj prezentoj dum la 88^a UK, post linioj pri la „Kabaredo” estas notite: „... kaj teatra versio de la versa epopeo de Harry Martinson 'Aniaro' en traduko de William Auld”. La nomo de sursceniĝanto kaj samtempe plenumanto tute forestas... Vere nekomprenebla „preterlaso”, aparte ĝena, ĉar plenumita flanke de rekona kultur-aganto, tradukanto al Esperanto de Ŝekspir-dramoj kaj entute konanto kaj ŝatanto de la teatro. Mi lasas tiun preterlasen... sen daŭraj komentoj.

Supra rimarko devus eble fariĝi impulso por pli vasta kaj profunda diskuto pri la nuna stato de nia teatro. Ĝenerale dirite, ĝi stas tre malbone pro diversaj kaŭzoj. Ĉu iasenca malzorgo fare de E-instancoj, foje eĉ neglekto, ne „kontribuas” i.a. al tiu stato...?

La Aŭtoro de Esperanto alte aprezis rolon de E-teatro por evoluo de la Movado kaj prezento de eblecoj kaj valoro de la Lingvo Internacia al la ekstera mondo. Konata estas lia eldiro ĉi-rilata en la letero al Carlo Bourlet (21 nov 1903), sed ankaŭ aliloke li rilatis al la afero. Pluraj talentaj artistoj kun granda engaĝiĝo kaj sindonemo aktivis, signife riĉigante E-kulturon, emocie ligante la Esperanti-

staron. Kelkaj, malgraŭ grandaj malhel-
poj, daŭre aktivas tiukampe. Por ke ili
ne estu forgesitaj, mi prilaboris historion
de Esperanto–teatro en 3 libretoj: *Skize
pri Esperanto–teatro, Universalaj Kongre-
soj kaj Esperanto–teatro, Polaj aktoroj kaj
Esperanto–teatro*, aldone suplementon
*Kajeroj pri Esperanto–teatro — Intervjuo,
Recenzoj, Artikoloj*. Aperis 3 eldonoj, fare
de nia amiko kaj ŝatanto de teatra arto,
Alfred Conzeth el Mettmann, Germanio
(forpasinta en 1998). Ĉi tiu verko konvin-
ke evidentigas signifon por nia kulturo
de E–teatro, funkcia ekde komencaj
jaroj de la Movado ĝis nuna tempo.

Sciate, ke teatra arto estas efemera,
ĝi, kaj ĝiaj plenumantoj, vivas tiom lon-
ge, kiom la spektantaro pri ili memoras.
Dramarto apartenas al la plej malfacila
branĉo de kulturo kaj postulas de la ak-
toro, kiu preparas la teatraĵon, ofte en
soleco dum monatoj, multe da rezigno
por poste nur... kelkfoje, aŭ eĉ unufoje
ĝin prezenti. Nepras tion kompreni kaj
ensentiĝi, por stimuli kaj ĉiuforte apogi
ilin.

Ĉijare [artikolo skribita en 2006
— red.] pasas 50 jaroj de publikigo de
Aniara de Harry Martinson. La Esperan-
to–prezenton sursceneje de lia grandio-
za verko oni devas konsideri kiel signi-
fan kontribuon kaj dignan omaĝon de
Esperanta komunumo al la granda ver-
kisto–humanisto, kiu per sia grandioza
verko celas averti la homaron kontraŭ
danĝerojn, kiujn ĝi mem kaŭzas. Ja, la sa-
mon celas esperantismo.

Varsovio, oktobre 2006

*Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato de
Adam Mickiewicz en Poznano, I semestro*

Maciej Jaskot

Esperanto senbaroka

Eseo pri literaturo

Kion trovus hodiaŭ Vilhelmo el Baskervil-
le esplorinte grandegan bibliotekon, sed
ĉi-foje ne en benediktana klostro en itala
montaro, sed en iu domo en Roterdam-
o? Nu, certe ni esperantistoj scias, ke te-
mus pri sufiĉe granda kvanto de libroj, de
verkoj originalaj en la Internacia Lingvo,
same kiel pri multnombraj tradukaĵoj...
Ĉu, tamen, antaŭ la esperantista libraro
Vilhelmo same raviĝus kiel vidinte en la
oktaedra biblioteko¹ la perlojn de la ok-
cidenta literaturo? Respondo al tiu ĉi de-
mando ŝajne ne ekzistas, ĉar nek ni vivas
en la 13^a jarcento, nek al Esperanto oni
povas apliki la samajn regulojn kaj litera-
turajn pritaksojn (tiuj siavice ligiĝas kun
la gramatiko) kiel al iu ajn alia nacia lin-
gvo. Kial? En tiu ĉi mia mallonga eseo mi
klopodos doni respondon al la ĵus starigi-
ta demando substrekante tamen, ke te-
mos pri konsideroj neobjektivaj, ĉar pri
miaj personaj pripensoj pri la Internacia
Lingvo en la vaste komprenata aspekto
de ĝia literaturo.

Mia skeptikeco rilate la reviiĝon de

¹ Mi daŭre referencas al la fama romano de Um-
berto Eco, en kiu la biblioteko de la beneditka-
na klostro (granda turo oktaedro–forma) estas la
ĉefa scenejo de la okazintaĵoj tie rakontataj.

imagebla esploranto de esperantista biblioteko en Roterdamo, esploranto samkulturkona kaj vasthorizonta kiel la figuro el la romano de Umberto Eco baziĝas sur tio, ke la literatura kreado en Esperanto estas ege mallongdaŭra. Ja, dum preskaŭ 130 jaroj la lingvo estis la esprimo majstre uzata de talentaj verkistoj, sed miaopinie ĝi ankoraŭ ne atingis sian kulminan esprimopovon, sian oran epokon. Mi tuj aldonu ĉi-loke, ke laŭ mi pro la fakto, ke la parolantoj de la lingvo konsistigas relative malgrandan kaj fermitan grupon de homoj ekzistas la danĝero, multfoje aperanta en hermetaj komunumoj, ke iu ajn persono kiu emas skribi komuniki siajn pensojn, sentojn, ideojn, fantaziojn iĝos kvazaŭ aŭtomate verkisto. Por ne malproksimiĝi, tamen, de mia ĉefa ideo mi rapide finu tiun ĉi flankrimarkon asertante plenkonscie, ke kun ĉiu jaro tiu danĝero en la esperantista komunumo malgrandiĝas, ĉar la lingvo iĝas ĉiam pli signifgrade instrumento viva, utiligata en malsamaj vivsituaĵoj, subigata al plej diversaj uzeksperimentoj kaj devigata al senĉesa evoluo kaj konformiĝo al la realo, kiun volas esprimi ĝiaj uzantoj

Ne subtaksante la gravan rolon de eminentaj kreivaj esperantistoj kiel Antoni Grabowski, Julio Baghy, William Auld kaj dekelkaj aliaj mi kuraĝas tamen ripeti, ke la Internacia Lingvo ne atingis sian kulminan punkton. Kial? Jen la dua (kaj ne lasta) „kial”. Ĉar Esperanto estas senbaroka...

Ne, ne ankoraŭ io devas veni?

² La unua verso de la poeziaĵo “Ĉu tio do-la vivo” de Nikolao Kurzens; Baza Literatura Krestomatio, Budapeŝto 1979, p.141

Kion tio signifas? Tuj mi klarigas, averte tamen, ke mi tion faras tute konscie el la eŭropcentrisma vidpunkto. Tute prave Esperanto estas konsiderata (ĉefe de la esperantistoj mem) la Internacia Lingvo monda, sed ja facile montreblas el la lingvistika vidpunkto, ke la lingvo mem estas eŭropeca³ kaj radikas en la Eŭropa pensuniverso⁴. Ni devas, do, akcepti tiun ĉi vidpunkton por sekvi miajn konsiderojn. Kaj ja la baroko-periodo en la literaturo, en la eŭropa literaturo, estas esenca kulturero de la nuna eŭropa, aŭ okcidenta socio. Ĉu Esperanto ne havinte tiun ĉi barokan evoluperiodon estas do lingvo malpli riĉa? Jen alia demando kiun malfacilas respondi. Iuflanke Umberto Eco en iu el siaj paroladoj⁵ asertas, ke la literaturo kontribuas al la formado de la lingvo, ĝi kreas identecon kaj komunumon kaj ne eblas imagi la malnovgrekan civilizacion sen Homero kaj la germanan identecon sen la traduko de la Biblio en la germanan de Lutero, kaj tiel ĉu oni rajtas postuli de la esperanta literaturo iun fazon, kiu ne estas ero esenca eĉ de la lingvo, ĉar la Internacia Lingvo neniam travivis baroko-periodon?

Danĝeraj povas esti la respondoj al demandoj jam ĉekomence ŝajne maltrafaj, sed ja pensinstigaj konsiderante, ke la esperantistaro postulas, ke la Za-

³ Sufiĉas konsideri ekz. nur la Esperantan fonemaron kaj fonotaktikon.

⁴ Ne temas ja pri riproĉo, sed simpla konstato. La kreinto de la lingvo vivis en jud-kristana idearomondo.

⁵ Parolado dum la festivalo de verkistoj en la itala Mantuo, septembro de la 2000^a jaro, poste publikigita en „Studi di estetica” („Il perché della letteratura”), 23, 2001.

menhofa lingvo estu konsiderata kiel heredaĵo de la monda (ne nur eŭropa) kulturo.

Unue, oni ne povas postuli de iu ajn lingvo evoluon similan al eĉ plej granda modellingvo (ĉu latina, ĉi-kaze?). Due, ĉiu lingvo kompreneble evoluas laŭ siaj propraj kriterioj. Tria, kiel mi jam menciis ĉekomence, al Esperanto oni ne povas apliki la samajn regulojn kaj literaturajn pritaksojn kiel al iu ajn alia nacia lingvo, ĉar ĝi estas lingvo artefarita kaj ekzistanta nur 120 jarojn. Doloriga konstato por esperantistoj? Eble, sed konstato prava.

Dum neniel mi povus malsamopinii kun la du supreaperintaj punktoj la tria jam malfermas la vojon al diversspecaj eblaj konsideroj de Esperanto kiel fenomeno lingva, des pli interesa, ke ĝi produktas ankaŭ sian literaturon. Kaj do? Kiel pritaksi la esperantan verkaron? Ĉu oni rajtas al ĝi apliki la samajn kriteriojn, utiligi dum ĝia esplorado la samajn literaturteoriaj iloj kiel dum la priskribo de nacilingvaj literaturoj?

Finfine mi kuraĝu diri „NE”. Ne, ĉar Esperanto estas senbaroka. Jen alifoje mi substrekas tiun ĉi vortumon per kiu mi mi volas atentigi ĝuste pri manko en la esperanta literaturo de iuj fazoj, kiuj signifgrade influis la eŭropajn nacilingvaj literaturojn kaj ĝis nun spegulas en ili kaj en la naciaj lingvoj mem per esprimoj, vortumoj, arkaismaj postrestaĵoj.

Esperanto nek estas malpli riĉa, nek malpli kreiva ol aliaj lingvoj, sed ĝi estas lingvo daŭre naskiĝanta, havanta apenaŭ 119 jarojn, lingvo kiu tuj mergiĝis en la tutan universon literaturan de la Malnova Kontinento. Ĝi estas lingvo, kiu ne havis ankoraŭ tempon „travivi” per siaj propraj fortoj (gramatiko, vortprovi-

zo, sintakso kaj ĉiutaga uzo, dum kiu la parola lingvo renkontiĝas kun literaturaj esprimoj) la vastan literaturheredaĵon de la okcidenta civilizacio. Tiel do, ĝi mia opinie ankoraŭ ne elmontris, ne produktis mem (kiel lingvo–organismo) elstaran esprimmanieron. Ĉe tiuj ĉi rimarkoj menciendas ankaŭ alia mia konsidero, ĉi-foje pli strikte ligita kun la gramatiko, kiu ja grandskale speguliĝas en la literatura kreado. Esperanto havas sian strike definitan gramatikon, kun serio da reguloj, kiuj malgraŭ tio, ke tute prave dirite ludas gravegan rolon por konservi la lingvon kaj malpermesi ĝian internan dispartigon je lokaj dialektoj kaj esperantidoj (simile al kio okazis kun la latina lingvo), verdire iusence bremsas certan formo–evoluon en la literatura kreado. Ja eblas en ĉiuj naciaj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto konsiderante ĝin samrajtan kaj samkreivan, verki belan poeziaĵon ne malobservante gramatikajn regulojn, sed malestas loko por ekscesi kaj la eksceso⁶ estas iu el la fortoj konservantaj poreterne juna la literaturon.

Kion mi celas do? Barokan periodon en la Esperanta literaturo? Jes, ĉar Esperanto ja kapablas atingi la lingvo–esprimpintojn kaj la koncepto de baroko, kiun mi tie ĉi ripetadas utiligante ĝin kiel ŝlosil–vorton por proksimigi konceptojn kiel lingvo–riĉeco, esprimpovo kaj vortumkreiveco difinas ankaŭ epokon, kiu nur post supraĵa analizo povas ŝajni ĥaosa, ĉar en ĉiu barokaĵo profunde kuŝas tavolo de ekstrema perfekteco kaj koncepto–ordo. Tiele Esperanto, la

⁶ Flankrimarkendas kiel konata pola poetino, nobel-premiitino Wisława Szymborska en iu el siaj poeziaĵoj (ĝuste „Nadmiar” — „Eksceso”) konsideras la eksceson.

Roma Ligocka

Roma Ligocka naskiĝis en 1938. Ŝi venas el la juda familio Abrahamen, vivanta de multaj generacioj en Krakovo. Kune kun siaj proksimuloj ŝi travivis likvidon de la Krakova geto, kaŝita en la kelo sub farbo-vendejo. Kun la falsa nomo Ligocka ŝi kaj ŝia patrino vivis dum la postaj militojaroj ĉe pola familio.

Post la milito ŝi studis pentroarton kaj scenografion en la Krakova Akademio de Belartoj. La unuan ekspozicion de ŝiaj pentraĵoj aranĝis Piotr Skrzynecki fine de la 50. jaroj en la fama *Piwnica pod Ba-*



perfekta lingvo (sic!) kun regula gramatiko indas havi sian barokon. Ni esperantistoj meritas ja niapropralingve kaj verdokore diri pri nia lingvo...:

Mi ĉiam kormiros pro via beleco:
Ne gravas por l'am fidela — foreco.
Ĉar kie mi korpe esti malpovas, en pensoj
mi estos,
Kaj prefere min mem ol vin mi forgesos;
Kaj tiom longe mia kor' malĝoji ne ĉesos,
Ĉis kiam vin — ĉarma mia — mia rigard'
ne karesos...⁷:

⁷ Będę się zawsze dziwował twojej piękności:
Nie szkodzi wierniej dalekość miłości.
Bo, gdzie ciałem nie mogę być, tam myślą będę,
A pierwej siebie niż ciebie zabędę.
A dotąd się serce me smęcić nie przestanie,
Aż cię oglądam, me wdzięczne kochanie.

Poeziaĵo [Do Zosie] de iu el la plej elstaraj polaj barokaj poetoj Mikołaj Sęp Szarzyński. Traduko propra. (Mi dankas pro la helpo al S-ino Barbara Pietrzak).

ranami (Kelo sub ŝafoj). Ŝiaj bildoj estis prezentataj dum ekspozicioj en Anglio, Svislando, Aŭstrio, Germanio kaj Usono. Multaj el la pentraĵoj de Roma Ligocka troviĝas ankaŭ en privataj kolektoj polaj, francaj, anglaj, israelaj, danaj, germanaj, italaj kaj usonaj.

Meze de la 60. jaroj Roma Ligocka debutis kiel dramistino sur la scenejo de la Teatro al Juliusz Słowacki en Krakovo per sia verko pri la morto de Hemingway *Dwa razy południe* (Du fojojn tagmeze). Post la sukceso de la teatraĵo ŝi forveturis al festivalo en Germanio, kie ŝi restis kaj vivas ĝis nun. Tie ŝi laboris kiel projektanto de kostumoj kaj scenografio por *show-bizneso*: kino, teatro, televido, reklamo, kaj ŝiajn verkojn oni trovas en multaj kolektoj dissemataj tra la mondo.

Al Krakovo ŝi revenis komence de la 90. jaroj por la Festivalo de Juda Kulturo kaj por la Krakova premiero de la filmo *La listo de Schindler* de S. Spielberg. En unu el la rolantoj — knabineto en ruĝa manteleto — ŝi retrovis sin mem.

Tiu okazaĵo kaj interparolo kun reĝisoro S. Spielberg estis impulso por skribi aŭtobiografian libron *Dziewczynka w czerwonym płaszczyku* (Knabineto en ruĝa manteleto, 2001), kiu disfamigis Roma-n Ligocka. Oni tradukis ĝin en 22 lingvojn (eĉ en la ĉinan), ĝi fariĝis internacia furorlibro, kaj la rajton pri ĝia filmigo aĉetis hollywooda produktanto.

Tiun eksterordinaran romanon konsistigas observoj kaj rememoroj de la aŭtorino. Samtempas en ĝi eventoj amuzaj kaj tragikaj, aperas diversaj lokoj — Krakovo, Vieno, Munkeno, renkontiĝas

Revemulo

Mia avo, Samuel Liebling, ĵus vendis sian gastejon kaj sentis sin treege feliĉa homo. Kun monujo plena de monbiletoj li tuj kuris al la domo por konigi tiun bonan novaĵon al la edzino. Sur la piedoj li havis siajn malnovajn kelnerajn ŝuojn, kies distingilo estis tia, ke eĉ post dudek jaroj de uzado ili malkomfortis. Sur lia kolo pendis nigra leda monujo, simila al akordiono. Hodiaŭ ĝi estis tiom plena, ke apenaŭ fermebla, do Samuel metis por certeco la manplato sur ĝin.

La avo Samuel estis revemulo kaj romantikulo. Kiel dekkvarjara knabo li forlasis sian gepatran hejmon, en kiu li naskiĝis — ĝi troviĝis en la urbeto Rawa Ruska, tre proksime al la pola-rusa ŝtatlimo — por iri piede al Krakovo. En la kapo li havis multajn junecajn planojn kaj revojn. Li deziris fari mirindajn agojn kaj iĝi eminentulo. Eble fama kantisto. Ĉar li havis belegan fortan voĉon. Aŭ konataa violonisto. Violonludon li mem ellernis, kaj de tempo al tempo li muzikis dum nuptofestoj aŭ aliaj solenaĵoj per la pruntita violono. Tiel perlaboritan monon li elspezis je aĉeto de la ŝuoj, en kiuj li venis al Krakovo. Li ankaŭ revis iĝi fama rabeno, tial li ekzercis antaŭ spegulo konvenan gestadon. Li imagis, ke li predikas dum religiaj festoj kaj kunvenintoj aŭskultas lin ravite. En la nuna tempo Samuel certe el-



homoj mortintaj antaŭ longe kaj tiuj, kiuj formas parton de la nuna vivo. Kun ŝerca nostalgio Roma Ligočka rememoras la tempon, kiam ŝi ne havis eĉ groŝon en la poŝo, sed tagmanĝis kun la princino de Monako. Ŝi pentras buntajn portretojn de amikoj, proksimuloj el la familio de sia edzo — ankaŭ artisto, sed ankaŭ de nekonatoj kaj eĉ malamikoj. Ŝi turnas pikan ironion kontraŭ rasaj antaŭjuĝoj, sed ankaŭ rezistas al la neplene manifestiĝanta *political corectness*.

La plej nova romano *Tylko ja sama* (Nur mi sola, 2004) kvazaŭ kompletigas la personan trilogion, al kiu krom *Dziwczynka w czerwonym płaszczyku* apartenas *Kobieta w podróży* (Virino dum vojaĝo, 2002), kiu estas kolekto de mallongaj rakontoj pri la postmilita, emigracia vivo de la aŭtorino.

Impulso por skribi la lastan libron Tyl-

ko ja sama estis artilolo publikigita en gazeto kaj akuzoj kontraŭ la patro de Roma Ligočka — onidire *kapulo* en koncentrejo. La aŭtorino okazigis privatan esploron, malkovris la veron pri la patro, pri lia koncentreja pasinteco, iom post iom ŝi rekonstruis la historion de maljusta akuzo kontraŭ li kaj malliberigo post la fino de la milito. Kvazaŭ paralele la aŭtorino prezentas amaĵon, kiun ŝi spertas kiel matura virino.

Malgraŭ la persona tragedio Roma Ligočka parolas konvinke: „La vivo povas esti belega eĉ por iu, kiu iris tra la infero — kaj mirakloj okazas. Al mi oni donacis iam mian vivon, kaj poste mi donacis ĝin al mi”. Ŝiaj vortoj montras, ke oni povas ami malgraŭ sufero, ke kun dolorplena pasinteco ĉiu povas konkordigi sin, kaj por amo ni ĉiam estas sufiĉe junaj.

kompilis Tomasz Chmielik

lernus aktoradon, sed tiam la aktorado estis konsiderata kiel malserioza okupo.

En la hejmo en Rawa Ruska neniu eksentis mankon de la knabo. Liaj gepatroj estis bonkoraj, honestaj homoj kaj sincere amis siajn infanojn, sed ili estis multaj, kaj la loĝejon ili havis tre malvastan kaj malluman. Kvankam tio povas ŝajni nekredebla, simple neniu rimarkis, ke li malaperis.

Lia patro, pia judo, sidis kliniĝinta dum la tuta tago, ĉe religiaj libroj, kaj li studis la sanktan skribon, sed pri la nombro de siaj idoj li havis ne tro klaran ideon. La patrino vendadis kokidojn sur la bazararo, por vivteni la familion. Kiam ŝi vespere revenadis hejmen, kun la malvarmiĝintaj manoj kaj ŝvelintaj piedoj, atendis ŝin pli gravaj okupoj ol kontroli, ĉu ĉiuj infanoj troviĝas en la loĝejo.

Do, la gepatroj malkovris la mankon de Samuel nur kelkajn monatojn poste, kiam el Krakovo venis letero de li. Sed tiutempe ilia filo jam dronigis sin plene en la grandurban vivon kaj ne intencis reveni. Li konvinkigis sufiĉe rapide, ke la loĝantaro de Krakovo ne bezonas famajn kantorojn, kaj certe ne en la persono de Samuel Liebling. Kiel muzikisto sen propra violono li ankaŭ ne povis kalkuli je laboro. Por iĝi rabeno ankaŭ ne estis espero.

Do, por ne pereĵi, li klopodis labori — kun malgranda prospero — en aliaj fakoj. Fine li estis dungita en mezbona ĝardeno distrejo kiel kelnero. Tie li rapide ellernis, ke al vodko kaj al vino oni povas aldoni sufiĉe multe da akvo, se la gastoj jam fariĝis ebrietaj, kaj tiamaniere gajni iom da propra mono. Li ellernis ankaŭ, ke dum mallonga tempo el nemulte da mono oni povas fari pli multe. Li ekkonis diversajn artifikaĵojn kaj ruzaĵojn, kio permesis al li trovi pli kaj pli novajn eblecojn de kroma enspezo. Iun tagon li fariĝis fiera posedanto de gastejo — kaj de la komenco li sincere malamis ĝin.

Ĉi estis mizera, malhela ejo. Samuel malamis la malvarman fiodoron de vodko kaj tabako kaj ĉiam ebriajn, kriegantajn gastojn, la malpuran plankon kaj malhastajn kelnerojn. Sed tiu gastejo donis al li monon por vivi, kio fariĝis precipe grava, de kiam li devis zorgi pri sia propra familio: pri la svelta edzino Maria kun la vizaĝo de infano kaj kun la malhelbluaj okuloj, kiuj aspektis kiel du maturaj prunoj, kaj pri tri filoj, naskiĝintaj jaron post jaro. Do, kiam iun tagon li trovis aĉetonton de sia gastejo, li ne cerbumis tro longe. Li rapide decidis la prezon kun la posedonto kaj tio estis la plej feliĉa tago en lia vivo. La tutan sumon, kiel tio estis en kutimo, li ricevis de mano al mano, kalkulis ĝin precize, metis en la falditan kelneran monujon kaj foriris rapidpaŝe, eĉ ne unu fojon rigardante malantaŭen. En sia hejmo li metis atente la monujon sur la kuirejan tablon — multe da koloraj biletoj elstaris el ĝiaj faldoj — kaj kontenta li sidiĝis sur la seĝon, kliniĝante malantaŭen.

De kiam Samuel havis la propran familion, ĉiuj liaj revoj ŝanĝiĝis. Nun li revis pri transloĝiĝo el tiu malhela, humida loko kaj el tiu korto, sur kiu dumtage ludis liaj infanoj. Li revis aĉeti malgrandan domon rande de la urbo, ĉirkaŭitan per ĝardeno, kie floras pomarboj. Li imagis, kiel la knaboj ludas tie kaj aŭtune kolektas pomojn. Oni povus aĉeti ankaŭ kelkajn kaprinojn, por ke Maria ilin melkadu; la knaboj ĉiam havus freŝan lakton. Li mem sidus en la ĝardeno kaj ripozigus siajn lacajn piedojn de kelnero. Dume li ne pensis kiamaniere ili vivtenos sin, sed en tiu momento tio ne havis signifon. Lia revo povos realiĝi jam morgaŭ. Finfine li havas monon.

Tiun vesperon Samuel trinketis bongustan vinon el sekaj vinberoj, kiun li mem faris, kaj kiun la edzino fojfoje verŝis en la kalikon. Li jam trinkis multe kaj ĉiam denove rakontis pri la propra domo, kaj Maria kun admiro rigardis lin per siaj grandaj, prunoformaj okuloj.

En malfrua vespero li eksentis lacegon. Lia vizaĝo ruĝiĝis, la voĉo sonis pli laŭte, fine li

decidis enlitigi kaj prenisi kun si la edzinon. Tiun nokton li generis ankoraŭ unu filon, la kvaran, post kio li endormigis en la brakoj de la edzino. Li dormis profunde, kontenta pri la mondo kaj pri si.

La sekvan tagon li ne levigis rapide, li jam ne devis zorgi pri la gastejo. Ankaŭ la edzino dormis longe. Ŝi songis pri verda herbejo, blankaj kaprinoj kaj rozkoloraj florantaj pomuoj.

Sed iliaj tri bravaj knaboj vekigis tre frue. Ekstere ankoraŭ estis grize, en la loĝejo regis malvarmo kaj ili estis malsataj. Do ili eniris kaŝe en la kuirejon, por serĉi ion manĝeblan. Ili trovis nenion, kaj sur la tablo ekvidis la dikan, duonmalfermitan monujon.

El ĝi elstaris koloraj biletoj kun bildetoj: bluaj, brunaj kaj ruĝaj. Moŝe, la plej aĝa filo elteris unu bileton kaj atente pririgardis ĝin. Poste li malrapide faris el ĝi ŝipeton. La ŝipfarado estis lia hobbio; tiucele li uzadis ĉiun peceton da papero, kiu enfalis en liajn manojn. Ili ja ne havis ludilojn. Lia pli juna frato, Dovid, mia patro, kiu diligente imitis ĉiujn fakojn de Moŝe, faris alian ŝipeton, kaj malgranda Benĉjo ne volis resti senlabora.

Baldaŭ la tuta tablo estis surperŝutita per vidindaj, buntaj ŝipetoj. Sed tie, kie estas multaj ŝipoj kutime tuj komenciĝas milito. Do, same okazis ankaŭ ĉi tie. La knaboj unue kunpuŝigis unu kun la alia, sed jam baldaŭ ili reciproke tiris siajn harojn, gratis kaj mordis sin kaj interbatigis — ĉio okazis en silento, por ne veki la dormantajn gepatrojn. Nur fojfoje aŭdigis siblado kaj anhelado. Ili fariĝis pli kaj pli koleraj tiel, ke ili komencis elŝiri ŝipetojn el siaj manoj kaj dispecigi ilin. Nur kiam sur la tablo kuŝis staketo da kolora ŝirita papero ili kvazaŭ vekigis. Nur nun ili komprenis, kion ili faris. Angorante kaj panike ili volvis ĉiujn disŝiritajn pecetojn da monbiletoj en gazetan paperon kaj ĵetis la pakaĵeton en klozeton. Tiomfoje ili fluigis akvon, ĝis kiam ĉio malaperis.

Poste ellitigis Samuel kaj venis en la kuirejon. Li ekvidis la malplenan monujon kaj kelkajn pecetojn sur la planko. En la necesejo iuj el la pecetoj algluigis al la klozeto. Liaj tri filoj sidis sur la planko en unu el la kuirejaj anguloj kaj ploris. Samuel ne punis la infanojn. Li sidigis apud ili kaj kune kun ili ekploris.

Sekvatage li remetis siajn ŝuojn sur la piedojn, ĉar la nova posedanto de la gastejo dungis lin kiel kelneron. Tamen Samuel ne longe laboris ĉe li; apenaŭ kelkajn monatojn poste, trideksesjara li mortis pro koratako, precize duonjaron antaŭ la naskiĝo de lia kvara filo.

Certe vi diros nun, ke mia avo estis revemulo, malfeliĉulo, vera malbonŝanculo.

Tamen li ne devis jam vidi kiel germanoj forbruligis lian gastejon, li ne devis rigardi, kion ili faris pri la familio de ĝia posedanto. Ankaŭ la sorton de siaj edzino kaj kvar filoj li ne devis sperti. Kaj tial — laŭ vortoj de mia patrino — Samuel Liebling estis feliĉa homo.

Kanario

Mia kuzo ne estis bonŝanca kiel infano; li ne ekkonis la gepatran amon.

Antaŭ la dua mondmilito, kiam li estis malgranda, liaj gepatroj estis tre okupitaj. Ili prenis transloĝiĝon de Parizo, kie ili vivis longe, al Krakovo. Por juda familio tiu decido ne estis favora, ĉar kelkajn semajnojn poste germanoj invadis Pollandon. Fermigis la kaptilo.

Malgranda knabo havis en geto preskaŭ neniun ŝancon. Lia patrino estis murdita. Ĉiutage oni arigis infanojn, pelis en kamionojn kaj forveturigis aŭ pafis surloke. Estis diversaj manieroj de pereigo. En tiuj cirkonstancoj grava montriĝis savo, kaj ne amo. Mia onklo, kiu ĉiam sciis, kiel trovi eliron, aĉetis truon en muro. Tiel oni diris. Estis viroj, kiuj en

malluma nokto faris en la geto–muro truon, eltiris infanon kaj ŝtopis la truon. Kompreneble ne senpage, tio kostis multe da mono, ĉar la okupo estis treege danĝera. Oni devis pagi ankaŭ al gardisto, por ke li „ne vidu”.

Do, tiamaniere iun tagon mia kuzo restis sola ĉe la arja flanko de la urbo; sepjara, nealta, maldikega. Neniu scias detale, kio okazis poste al li. Estas certe, ke forprenis lin iuj ebruloj, kiuj batis lin kaj devigis, ke li almozu por ili monon je vodko, foj–foje li estis forpelata sur la straton, kiam restis nenio por manĝi aŭ kiam ili havis tian kapricon. Poste ili akceptadis lin denove. Li estis tre malbone traktata, eble eĉ perfortita. Kiu scias pri tio hodiaŭ? Eĉ li mem ne memoras.

Post la militfino, dum unu el la promenoj tra la urbo trovis lin mia patro. La kuzo sidis maldikiĝinta, malpura kaj malzorgita sur monteto da ŝtonoj. La patro venigis lin al nia hejmo kaj kun larmoj en la okuloj transdonis al mia patrino. Ŝi lavis lin, sed pedikoj tre rapide trovis vojon al haroj sur mia kapo. Tiamaniere la unuaj familiaj rilatoj estis ligitaj.

La postmilita periodo ankaŭ ne estis tempo por amo, almenaŭ ne por la amo al infanoj. La patro de mia kuzo baldaŭ edziĝis al eleganta blondulino kaj ŝanĝis la familian nomon, kunmetante ĝin kun la nomo de la urbeto, kie li ekkonis sian novan edzinon. La duonpatrino ne montris familiajn sentojn al la juda knabo, kiu ofte estis malobeema. Anstataŭ amo fojfoje ŝi montris al li pardonon.

Nervoza, sovaĝa, ĉiam obstina, li estis loĝanta dum kelka tempo ĉe ni, antaŭ ol lia patro denove kunprenis lin en sian hejmon.

Somere de 1949 ni vojaĝis por feriado ĉe Balta maro. Mi estis ekscitiĝinta kaj ravita, ĉar unuafoje mi vidis la maron. Iu devis tamen gardi nian loĝejon kaj nutri kanarion de onklino Manjo. Do, mian kuzon oni lasis hejme. Neniun interesis, ke la dekkvara knabo ankaŭ tre volonte ekvidus la maron. Tiam neniu demandis infanojn pri iliaj deziroj kaj revoj.

Do, la kuzo restis sola en la sunvarma urbo, en nia orfigita loĝejo. La sola kamarado, kun kiu li povos interparoli, estis la kanario; kaj mia kuzo tre ŝatis interparoli. Tra la kradoj de la kaĝo li gatis la flavan kapeton de la birdo. Li starigis la kaĝon sur la balkono, por ke ili ambaŭ ĝuadu belan veteron. Li havis nenion por fari; ĉiuj liaj amikoj forlasis la urbon. Mi povas nur imagi, kio tiam okazis; mia kuzo, rigardante la birdon, certe ekpensis, ke ĝi sentas tiel, kiel li, malesperan sopiron pri libereco, malproksimeco. Tiu sopiro preskaŭ disŝiris lian knaban koron. La kanario rigardis la knabon per siaj rondaj nigraj okuletoj kaj sopire ekkantis. Oni ne scias, kiu penso regis la manon de la knabo, kiam li malfermis la kaĝon.

— Elflugu por iom da tempo, birdeto, kaj poste vi revenos — li diris.

Dum kelkaj sekundoj la malgranda, flava globeto estis videbla en la blua ĉielo kaj poste ĝi falis surteren — la birdo rompis al si la flugilojn kaj mortis. Ĝi ne kapablis flugi, ĉar la tutan vivon li pasigis en kaĝo. Tamen la kuzo verŝajne ne sciis tion.

Post la reveno el feriado oni ne tuj rimarkis mankon de la favorato de onklino Manjo. La sunbruna ka ripozinta familio elpakis siajn vestaĵojn, konkojn kaj buntajn ŝtonetojn.

Baldaŭ tumultiĝis. Onklino Manjo ekploregis. La plenkreskuloj ĉirkaŭis la junan murdinton, klopodante demandi lin. Estas malfacile kompreni, ke mallonge post la terura milito tiel dolorigis ĉiujn la sorto de la kanario. Bedaŭrinde tio estas vero.

— Lasu ĉi knabon en kvieto, li ja ne faris tion intence — petis mia patrino, sed vane.

La kuzo staris kun paliĝintaj lipoj, ofendita kaj furioza. Mi sentis tion bone. Pro timo kaj malespero li komencis pli kaj pli energie kaj senhonte mensogi.

— La kanario mem malfermis la kaĝon kaj fuĝis. Simple ĝi forflugis! Ĝi vivas!

— Vidu kiel la bubaĉo kapablas mensogi kaj trompi! — indignis onklino Manjo.

Post kelkaj tagoj revenis ankaŭ la onklo kaj forprenis sin filon hejmen. Jam en la ŝtuparejo komenciĝis tumulto.

Onklino Mania ricevis novan kanarion.

En 1967, mia kuzo, tiutempe konata artisto, venis de Parizo al Vieno, por prezenti tiesian novan verkon, kiu jam estis mondfama. Li ekloĝis en komforta hotelo, mi kun la edzo iris tien por lin venigi al mia patrino; jam de kelkaj jaroj ŝi estis loĝanta en Vieno kaj nun ŝi deziris akcepti lin per solena vespermanĝo.

Li okupis vastan apartamenton, el kiu oni vidis la tutan urbon. Meze de la ĉambro staris granda korbo kun rozoj kaj blanka siringo — donaco de la hotela estraro. La kuzo surmetis rapide malhelbluan jakon el kaŝmiro. Por momento li haltis antaŭ la korbo, por elpreni el ĝi kelkajn florojn al sia onklino — mia patrino — sed en la lasta momento li forgesis tion fari.

Mia patrino, kortuŝita, atendis en la pordo. Ili ne vidis unu la alian dum jaroj. Li iom kreskis, kaj ŝiaj haroj griziĝis.

— Mi ne malfermis tiam la kaĝon, onklinjo — li diris anstataŭ salutvortoj.

— Ho, ne!

Li sidiĝis sur la sofon antaŭ mia patrino.

— Mi ĝin ne murdis, kreu al mi!

— Tio ja estas malnova afero — la patrino konkorde frapis lin ĉe la ŝultro.

Subite en la okuloj de la kuzo aperis larmoj. Li palpebrumis rapide por kaŝi tion. Sed post momento lia vizaĝo ŝanĝiĝis al la vizaĝo de infano kaj li eksplodis per malespera ploro. Liaj ŝultroj tremis, li singultis de ploro, kaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj. Li frotis siajn okulojn per ambaŭ pugnoj kiel malgranda knabo.

— Mi ne murdis ĝin. Mi ne murdis tiun malbenitan birdon.

Rozkolore

Tiu rakonto enhavas nek pintumon, nek moralajon, nek iun ajn kaŝitan sencon. Ĝi estas simple historieto el familia albumo. Sed ĉu pro tio mi ne prezentu ĝin al vi?

En la komenco de elmigrado ni estis tre malriĉaj. Kompreneble tre facile oni diras tion, se en tiu frazo troviĝas la vorteto „estis”. Verŝajne ni ne estis tute malriĉaj, nur ke dum longa tempo ni ne havis monon. Tamen ni estis riĉaj per niaj konceptoj, planoj, esperoj kaj ambicioj.

Niaj manĝoj ofte konsistis nur el supo — buljona kubeto solvita en akvo — kaj pantranĉaĵo, ŝmirita per dispecigita ajlo. Tra la urbo ni piediradis, sendepende de la vetero, por ŝpari monon, ne pagante biletojn por tramo kaj buso. Sed tio malbone efikis al miaj piedoj kaj ŝuoj kun altaj kalkanumoj.

— Mi devas iel perlabori iom da mono — diris la malesperanta, sed decidiĝinta Janĉjo — kiel kelnero aŭ lavanto de vazaro aŭ puriganto de fenestroj, kiel iu ajn.

— Ne, tion vi ne faros. Mi ne permesos al vi. En iuj situacioj mi sciis, kiel mi kontraŭstariĝu. Ĉiam mi opiniadis, ke la usonan songon „de ŝupurigisto al milionulo” oni ne povas apliki al ĉiu homo kaj en ĉiu situacio — kaj tio certe ne koncernas Janĉjon. Mi estis juna, plena de admiro por arto kaj artistoj. Mi pensis, ke se la homo havas ian dona-

con de Dio, talenton, li devas ĝin efektiviĝi malgraŭ tio, kio okazos. La arto estas delikata planto, nepre fleginda, velkanta dum lavado de vazaro kaj neniam plu ekfloronta denove. Pli bone estas vivi sen mono ol poste senkulpigi sin antaŭ infanoj: ...Tiam mi povus... certe mi scius kiel... se vi ne aperus en la mondo.

Ne, tion mi ne volis.

Ĉiun plian fojon ni renovigis loĝejon, kiun ni luprenis portempe — kio en nia vivo estis ne „portempe?” — laŭ favora prezo. Ĝi estis tre malzorgita. — Por ciganoj ĝi taŭgas — diris la mastro. Ŝi komprenis mian nomon, Roma, kiel nacian apartanecon.

Ni farbis ĝiajn murojn, vernisis la plankojn. Ni deziris tiun mirindan nesteton, kiu servos kiel azilo, kiel propra sorĉo-mondo, kiel paradizo al nia infaneto. Ni aĉetis malmultekostajn, diversstilajn meblojn, kiuj per blanka farbo ŝanĝiĝis en juveletojn. Mi stebis la tutan stakon da buntaj kusenetoj — tio estis hipio-epoko kaj ni sentis nin kiel eternaj studentoj.

Mia edzo ne havis eksterordinarajn metiistajn talentojn, do ofte speguloj pendis oblike, elektra dukto perdiĝis malantaŭ la ŝranko kaj ne plu estis trovebla, porĉoj malcedadis. Sed kiel ĉiuj viroj, li estis tre fiero pro siaj teknikaj faroj kaj miajn kritikajn opiniojn li akceptis kiel esprimon de mia abomeninda karaktero kaj malico.

Malgraŭ tio nia oazo estis preta.

— Kaj nun mi ŝatus havi rozkoloran banejon, kian mi vidis en holivudaj filmoj — mi esprimis la deziron per vortoj.

Mi aĉetis rozkolorajn viŝtukojn (dum forvendado ili estis malmultekostaj), rozkolorajn trinkpotetojn por dentlavado, rozkolorajn sapojn kaj grandan ujon kun rozkolora farbo.

— Mi farbos la murojn en la banejo, se ni jam havas la farbon — sin proponis Janĉjo, kaj mi rekonis tion, kiel tre afablan sindonemon de lia flanko.

— Tamen hodiaŭ ni iras al teatro — mi memorigis lin pri la plano.

— Ho, mi sukcesos fari ĉion, antaŭ ol ni devos eliri, la farbado ne daŭros pli longe ol du horojn — mi volus jam fini tiun malbenitan renovigadon.

La banejo estis mallarĝa, sed tre alta. Joĉjo devis starigi unu ŝtupetaron en la bankuvon. Sur la alia ŝtupetaro pendis sitelo da rozkolora farbo. La ŝtupetaro, sur kiun grimpis Joĉjo, ne teniĝis firme, do li balanciĝis kun peniko en la mano kiel akrobato. Li ĉiam estis bona dancanto.

Dume mi okupiĝis unue pri la infano, poste mi beligiĝis miajn okulojn, kaj ankoraŭ pli poste mi zorgis pri la kapdoloro, kiun mi havis ĉiam, antaŭ foriro el la domo.

— Jam ĉio preta! — mia edzo eniris la ĉambron.

— Vi miros — li diris kun apenaŭ kaŝita fiereco.

Ni ŝanĝis vestojn; Joĉjo surmetis unusolan malhelgrizan kostumon, la edziĝfestan kostumon, kiu nun servis por solenaj okazoj. Li ĵetis sian lastan rapidan rigardon en la farbitan banejon. Grandioze! Nur unu angulo super la bankuvo estis malpurblanka, la farbanto simple preterlasis ĝin.

— Beeeele, ĉu? — Joĉjo fiere elŝovis la bruston.

— Kaj tiu angulo?

— Kiu angulo? Ke vi ĉiam devas trovi ion riproĉindan...

— Vi preterlasis tiun angulon.

— Mi preterlasis? Bagatelaĵo, tuj mi ĝin farbos.

Kaj en tiu plej eleganta kostumo li grimpis sur la ŝtupetaron.



Roman Kurkiewicz

Zamenhof foriru en Madagaskaron

Li estis kandidato al Nobel–Pacpremiito. Bjalistoko estis lia familia urbo. En aĝo de 10 jaroj antaŭ longa tempo ol li iĝis okulkuracisto kun viena diplomo, li verkis la dramon „Babelturo, kiu respegulis bjalistokan tragedion” en 5 aktoj.

Kaj kvankam li poste estis kuracanta vidkapablojn kaj okulmalsanojn, ja plej grava por li estis — dum lia tuta vivo — lingvo kaj revo pri interhoma kompreniĝo. La laboron pri agado de sia vivo li komencis jam en mezlernejo. En 1885 la projekto nomata nun la lingvo Esperanto estis alpreninta decidforme.

La 26-jaraĝa Ludoviko Lazaro (Lejzor) Zamenhof ĝis fino de sia vivo flegis

kaj disvastigadis sian utopion de feliĉo, kiun li komprenis kiel eblecon parole interkonsentigi ĉiujn ĉi, kiuj jam post babetura epizodo pro intermiksigo de la lingvoj ne scipovas interkompreniĝi. Li estis konvinkita, ke samkiel Prometeo forŝtelis fajron de dioj, same li ofertas al homaro unu kompreneblan, simplan lingvon.

Multaj placoj, stratoj, institucioj, promenadlokoj, iniciatoj, kiuj portas ĝis nun lian nomon, povas nur konfirmi tiun tezon. Eble neniam nomo de polo aperas en tiom da lokoj sur la tero. Nuntempaj kreintoj de nova signo–lingvo de la post SMS-a erao donis titolon „zlango” al sia



— Kio pri la teatro? — mi diris demande.

— Mi devas nun farbi tion ĝis la fino. Jam sufiĉe! Fermu la pordon kaj lasu min!

Mi obeis la ordonon. Post kvin minutoj mi aŭdis laŭtan bruon, krion, blasfemon. Kaj nur poste mallaŭtan ĝemadon.

Mi enkuregis la banejon. Joĉjo sidis en la bankuvo, surverŝita per la rozkolora farbo, apude kuŝis la ŝtupetaro kaj la sitelo. Rozkolora estis lia kostumo, haroj, vizaĝo kaj ankaŭ okulvitroj. La rozkolora farbo gutis de lia barbo sur la plankon.

Bedaŭrinde ne tuj mi povis helpi al li, ĉar mi ektermegis pro rido. Kiam mi hodiaŭ imagas mian edzon — kompatindan, malriĉan polan elmigrinton, senhelpan intelektulon kun okulvitroj, kiu tiom klopodis plibeligi la loĝejon por sia amata edzino — kiel li sidas en la bankuvo, vestita per la plej eleganta kostumo, surverŝita per la rozkolora farbo — mi estas preta tuj eklori. Sed tiam mi nur ridis stulte, ridegis, kaj de mia edzo gutetis, fluetis la farbo.

Tia estis mia rozkolora edzo.

Esperantigis Dorota Burchardt

projekto, aldoninte unuan literon (z) pro sia estimo al laboro de Zamenhof kaj lia honoro. Kvankam nuntempe la nombro de Esperante parolantaj oni taksas je unu miliono kaj duono da homoj sur la tuta terglobo, do samtempe ili formas unu el plej pitoreskaj kaj interesaj socioj.

Por kelkaj miloj da familioj Esperanto estas la unua, familia lingvo. Ĝis pasinta semajno kaj konkrete ĝis la 15^a de decembro, kiam en la tuta mondo esperantistoj festas naskiĝdaton de Zamenhof, Pola Radio (Radio Polonia) estis disaŭdiganta jam seninterrompe 47 jarojn programon en la lingvo Esperanto. Tiu programo estis ja vizitkarto, rememorigo pri nekutima, humanisma okazo de la plej fame konata bjalistokano. Li prezentis tian malgrandan polan eksterlandan politikon, kultivitan kontraŭ eta mono, konstruanta senmezureblan kvankam malfacilan — por aprezo — simpatian kaj bonvolemon al lando ĉe Vistulo-rivero.

Emilio Cid el Brazilo skribis: „Mi ne povos imagi Pollandon sen Esperanto, same kiel mi ne imagas Brazilon sen piedpilko”.

Bedaŭrinde ĉi frazon li skribis poste al prezidanto de Pola Radio Krzysztof Czabański kontraŭ forigo de Esperanto-programo el anteno de Pola Radio, post la decido de vicprezidanto de Radio — Jerzy Targalski, la ekstreme dekstrulara publicisto. Vicprezidanto Targalski, motivante sian decidon, uzis antisemitajn argumentojn. Per nomo de sinjoro Targalski laŭ mia opinio kaj mia profunda konvinko neniam estos nomumita kia ajn strato, placo aŭ loko, ĉar mi ne povas imagi kaŭzon pro kiu tio devus ekesti. Nek en Pollando, des pli nek en la mon-

do. Ecepte nur se ie, meze de dezerto, oni destinos lokon por stratoj dediĉe al tiuj, kiuj famkonatiĝis pro stulteco, terurega manko de antaŭsento, jam pri posedo de imago ne menciante. La vortoj „profesiaj kompetencoj” ĉi kaze ne aplikeblas.

Radio Polonia estas pagata de pola Ministerio por Eksterlandaj Aferoj. Sinjoro Targalski asertas, ke publika radio ne povas elspezi po 4000 PLN ĉiumonate je bezonoj de radioprogramoj en la lingvo Esperanto. Mi pensas, ke Pollando ne povas permesi al si iun ajn elspezon rilate sinjoron Targalski. Ĉar ĉiu forĵetita publika monunujo por lia intelektuala aktivado estas la mono forĵetita en abismon, la monunujo, kiu alportas perdojn nekalkuleblajn, senbezonaĵajn. Kaj kiu detruas ordinaran kapitalon de kulturo konstruata per revo, genio kaj verko de unu homo trans pli ol 120 jaroj. Sinjoro Targalski povas ne kompreni tion. Sed tute nekomprenebla estas ĉi-kaze lasi lin ĉe la posteno de vicprezidanto de Pola Radio. Ankaŭ egalrange oni povus aligi Stanisław Łyżwiński (pola parlamentano konata pro seksafero) al Pola Episkopeca Komisiono por aferoj de Familo. Sinjoro Targalski evidentiĝis per civiliza analfabeteco. Kaj ĉio aspektas tiel, ke tio estas ĉe li jam kronika. Venis tempo por movo de prezidanto Czabański. La movo de ŝako-mato. Tiun plenumiĝon mi deziras al mi mem kaj al vi Gesinjoroj okaze de festotagoj.

Esperantigis: Edward Jaśkiewicz

La felietono aperis en populara semajna pola revuo „Przekrój”. La teksto aperas kun la afabla permeso de red. Jacek Kowalczyk, nome de Wydawnictwo Edipresse Polska SA.

Zamenhof — pola kuracisto

Homoj, kiuj akceptas okupadon de Polando pere de tri iamaj imperioj diras, ke Zamenhof estis ruso. Laŭ tiu penso Henryk Sienkiewicz estis ankaŭ ruso kaj Maria Skłodowska-Curie estis rusino (konataj estas problemoj kun ŝia rusa pasporto en Parizo).

Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko, poste vivis en Varsovio, ambaŭ urboj apartenis antaŭ la konkeroj kaj apartenas nun al la pola teritorio. Li estis judo, li estis ankaŭ polo, ĉar laŭ internaciaj leĝoj, mi substrekas tion, INTERNACIAJ LEĜOJ, homo naskiĝinta sur la teritorio okupata, apartenas civite kaj leĝe al la ŝtato, kiu perdis iam liberecon kaj poste reakiris liberan staton, en tiu kazo al Pollando. Pro tio en ĉiuj gravaj enciklopedioj de la mondo Ludoviko Lazaro Zamenhof estas menciita kiel pola kuracisto, ĉar alie ne povas esti, tiu afero estas jam de longe internacie prijuĝita. Pri tiuj, kiuj nur agitas por homaj rajtoj (ankaŭ lingvaj) kaj ilin ne akceptas, eĉ ne respektas, mi nun entute ne volas opinii, sed ilia eraro, kompare al internaciaj interkompreniĝoj, estas evidenta.

Post falo de komunismo, ruso loĝanta en Litovio, se li tie naskiĝis, estas litovo, sendepende de la uzata lingvo, palestinano estos iam palestinano kaj ne izraelano, ĉeĉeno estos ĉeĉeno, kiam Ĉeĉenio estos libera (pri tio mi kredas), kaj ruso aŭ forvojaĝos, aŭ restos en Ĉeĉenio kiel ĉeĉena civitano.

Laŭ tiuj klaraj internaciaj kriterioj Zamenhof estis polo, eĉ se li (povas esti) mem volus esti ruso. Ĉiuj aliaj kriterioj (ekzemple familiaj) en tiu ĉi kazo entute ne gravas. Interesa afero, ĉu li parolis kun

poloj ruse kiel kuracisto? Mi garantias, ke ne, ĉar li entute ne havus pacientojn!

Jan Stanisław Skorupski

Zuriko, la 23^{an} de decembro 2006



Doron Modan

Kion Zamenhof vere diris al la juda delegacio

En n-ro 140 de *Israela Esperantisto* aperis nekonata letero de Zamenhof, el kiu ni lernas pri skandalo, post kiam Zamenhof malkonsilis al juda delegacio saluti la 8^{an} Universalan Kongreson nome de la juda popolo. Pri tio i.a. polemikis Zamenhof kaj la publicisto Boroĥov. Nun ni povas konstati kion Zamenhof vere diris al la juda delegacio, el memoraĵoj de ano de tiu delegacio, D-ro Avraham Ĥomet. Ĝi aperis unuafoje en *IE* n-ro 60 (aprilo 1977), sed kun la lastnumeraj gravaj dokumentoj, ĝi legeblas nun en ties plena kunteksto.

„En la 8^a UK estis kelkaj judoj, kaj ni decidis rajtigi unu el ni, s-anon Kvitner, instruiston de la hebrea lingvo, saluti la UK-on en la nomo de la juda popolo. La sekretario de la UK, d-ro Rosentstock, tamen ne permesis tion. Lia kialo estis, ke „judoj ne estas nacio”. Nia delegacio turnis sin al d-ro Zamenhof, kiu loĝis en la Franca Hotelo en Krakovo. Li akceptis nin tre ĝentile, aŭskultis nian plendon, trankviligis nin kaj klarigis, ke la kontraŭuloj de Esperanto, la anoj de la lingvo Volapük, uzas antisemitajn argumentojn kontraŭ Esperanto, ĉar la kreinto de Esperanto estas judo.

D-ro Zamenhof petis: „Ne tuŝu dum

la UK la judan problemon, ĉar de tio nur suferos la movado”. Li asertis, ke li estas nacia judo, ke li pruvis ĝin tradukante judajn klasikajn verkojn Esperanten. Li tre petis nin: „ne parolu pri tio, ke la kreinto de Esperanto estas judo, ĉar oni batalas kontraŭ la movado per la argumento, ke Esperanto estas juda kreitaĵo”. Ni obeis lian peton kaj la 8^a UK malfermiĝis sen la juda saluto”.

(El: *Israela Esperantisto*, n-ro 141)



Bernard Golden

Al kiu gento apartenis d-ro L. L. Zamenhof? (fragm.)

Trafoliumante diversajn publikaĵojn en Esperanto kaj en etnolingvoj — propagandilojn, didaktikajn verkojn, historiojn de Esperanto, biografiojn pri Zamenhof — oni trovas jen mankon de precizaj informoj pri la genta apartenado de Zamenhof, jen kontraŭdirajn „faktojn”. La plej oftaj karakterizoj estas „la pola d-ro L.L. Zamenhof”, „la pola okulisto” kaj „la pola kuracisto”. De tempo al tempo oni nomas lin ruso. Malofte oni diras la veron: li estis judo (aŭ hebreo, laŭ la malnova lingvouzo).

Zamenhof ne povas esti membro de la pola gento. La aŭtoro de Esperanto mem difinis la vorton „gento” jene: „la aron de ĉiuj homoj, kiuj havas saman devenon kiel mi, mi nomas mia gento”.

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) difinis „polo” jene: „ano de ĉefgento loĝanta en Polujo”. En pluraj verkoj Zamenhof klarigas, ke li apartenis al minoritata gento en Polujo; sekvas, do, ke li ne

estis ano de la pola ĉefgento. Li neniam povis esti eĉ civitano de Pollando, ĉar la sendependa respubliko estiĝis nur post la morto de Zamenhof en 1917. Dum sia tuta vivo Zamenhof estis regato de la cara Rusia Imperio.

Zamenhof konstatis pri la estiĝinta konfuzo kaj eksplicite neis sian polecon. En letero sendita al la Loka Kongresa Komitato de la UK en Krakovo en 1912, Zamenhof skribis: „[...] ne nomu min ‘polo’ por ke oni ne diru, ke mi — por akcepti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas [...] laŭ mia deveno mi kalkulas min al la gento hebreo”.

En poŝtkarto sendita al s-ro Theodor Cejka el Bystřice pod Hostýnem en 1906, Zamenhof informis, ke lia nacio estas „ruslanda hebreo”, lia religio „hebrea-hilelista” kaj la „lingvo de mia gepatra domo estis la lingvo rusa”. Rimarku: hejme li ne parolis la polan lingvon. Plue, la familia nomo „Zamenhof” ne estas pola. En letero al berlinaj esperantistoj en 1904, Zamenhof klarigis, ke ĝi estas germana nomo (originale Samen(h)of), kiun li fonetike transskribis per ‘z’.

Jam estis publikigitaj pluraj fotografiaĵoj, tajpitaj kopioj kaj tradukoj de oficialaj ruslingvaj dokumentoj, kiuj plej objektivite pruvas, ke Zamenhof estis judo. Lia naskiĝo estis registrita en la matrikul-libro de la Juda Komunumo de la urbo Bjalistoko kun indiko ankaŭ de la dato de cirkumcido. La „Atesto pri Matureco”, kiun la juna gimnaziano ricevis en 1879, komenciĝas per la sekvaj vortoj: „Tiu ĉi estas donita al Lazar Zamenhof, de la Hebrea konfesusio [...]”.

Kvankam ekde la unuaj jaroj de la historio de Esperanto Zamenhof neniam

Claude Piron

PSIKOLOGIAJ ASPEKTOJ DE LA MONDA LINGVOPROBLEMO KAJ DE ESPERANTO

Parto dua

Tabuo

Fakte, tabuo tuŝas la tutan kampon de interpopola kaj interŝtata lingva komunikado. Se vi studas la dokumentojn, kiuj estas produktataj tiukampe, vi konstatas, ke multe pli ol 99 elcentoj prezentiĝas, kvazaŭ Esperanto ne ekzistus, kvazaŭ la homaro havus nenium sperton pri alia maniero internacie komuniki ol la kutimaj per tradukado, interpretado aŭ la uzo de prestiĝa nacia lingvo kiel la angla. Esperanto estas tabua. Oni ree tion vidis antaŭ nelonge en Bruselo, en la Eŭropa Parlamento, dum kunsido de la t.n. Institucia komisiono, kiu pri-traktis la demandon pri (ne)komunikado en Eŭropa Unio. Kio pravas, ke temas pri io tabua, estas la rifuzo kompari.



kaŝis sian judecon, aliaj homoj intence pri-silentis tion. Kial? La respondo estas simpla: pro daŭra judofobio kaj antisemitismo en, kaj ekster la Esperanto-movado.

Fonto: *Eventoj*, 0018 (2/1992)

NDLR: Supraj materialoj (kaj multegaj aliaj, troveblaj en diversaj fontoj) devas vekti intereson kaj diskuton. Ni atendas leterojn de niaj Legantoj. Esprimu sian scion kaj opiniojn pri la temo. (KL)

En scienco, kiam oni volas scii pri la valoro de io, oni ĉiam komparas al referenco. Antaŭ ol decidi pri nova medikamento, oni komparas ĝian efikecon al jam konataj substancoj. Kaj kiam oni decidis fari tiun aŭ alian grandan laboron, ekzemple konstrui novan stadion, kion oni faras? Oni lanĉas ofert-alvokon. Oni proponas al la diversaj firmaoj submeti projekton, kaj oni *komparas* la diversajn ofertojn por akcepti la plej racian rilate al ĝiaj kostoj kaj al la aliaj kriterioj, kiujn necesas konsideri. Tio estas la normala proceduro. Fakte ekzistas tuta scienca metodo pri la arto decidi elektante la plej bonan manieron atingi difinitan celon. Tiun sciencajn metodon oni nomas „operacia esplorado” („operations research”, „recherche opérationnelle”). Ĝi naskiĝis dum la dua mondmilito kiel maniero elekti la plej bonan vojon por transporti varojn aŭ homojn plej rapide kaj kun malplej da risko. Nu, se oni aplikas la regulojn de operacia esplorado al la lingvoproblemo, oni konstatas, ke, el ĉiuj rimedoj nuntempe observeblaj en la praktiko, la optimuma, por atingi la celon estas Esperanto. Sed por tion trovi, necesas kompari la diversajn sistemojn unu al la aliaj, do vidi objekte, en la praktiko, (surterene, kiel oni nun diras), kiel Esperanto prezentiĝas kompare al

gestoj, al balbutado en lingvo malbone regata, al la uzo de la angla, al tradukado de dokumentoj kaj interpretado de paroladoj, ĉu samtempa, ĉu posta, al uzo de la latina, ktp. Nur tia komparo ebligas konkludi, kiu estas la plej bona sistemo.

Sed kvankam miloj kaj miloj da paĝoj troviĝas en dokumentoj pri la lingva situacio, jen en UN, jen en Eŭropa Unio, jen en lingvikaj fakoj de universitatoj ktp, la dokumentoj, kiuj aliras la problemon surbaze de komparo inkluzivanta Esperanton estas malpli nombraj ol la fingroj de unu homo. Ĉar komparo de la diversaj eblaj solvoj al problemo estas io tiel ofta alikampe, ĝia foresto en la kampo de internacia lingva komunikado pruvas, ke agas tabuo.

En kio radikas la tabuo?

Kial tiu patologia aliro al la lingvo-problemo? Denove la kaŭzoj estas multaj. Estas politikaj kaŭzoj. La ideo, ke la intelekto plej netalentaj individuoj povu senbare komuniki de popolo al popolo malplaĉas al multaj ŝtatoj. Estas sociaj kaŭzoj. Tiu sama eblo malplaĉas al la privilegiitaj sociaj tavoloj. Homoj, kiuj scias sufiĉe bone la anglan aŭ alian gravan lingvon, havas multajn avantaĝojn super homoj, kiuj scipovas nur kelkajn lokajn lingvojn, ili tute ne deziras perdi tiujn avantaĝojn. Tio estas aparte videbla en la t.n. Tria Mondo.

Sed mi opinias, ke la ĉefaj kaŭzoj de la tabuo estas psikaj. La kerno de la problemo kuŝas en la emocia pezo, ŝargo, etoso de la koncepto „lingvo”, en ĝia povo vibrigi tre profundajn fibrojn de nia animo. Ni pensas per konceptoj aŭ vortoj. Kaj la vortoj aŭ konceptoj ne estas nur intelektaj aferoj, ili havas ian emocian, ian

sentan etoson. Ne ĉiuj, sed multaj. Se mi diras „milito” aŭ „mono” aŭ „patrino” aŭ „sekso” aŭ „atomenergio”, io vibras profunde en vi, kvankam vi tion ĝenerale ne konscias. Alivorte, ni ne estas indiferentaj fronte al granda parto de niaj konceptoj, ĉefe al tiuj, kiuj estas iel ligitaj al niaj deziroj, bezonoj, aspiroj, plezuroj, suferoj, potenco, ktp.

Inter tiuj konceptoj kun forta emocia etoso troviĝas la koncepto „lingvo”. Kial? Ĉar la lingvo elvokas la fakton kapabli komprenigi sin, kaj la eblo esti komprenata estas unu el la plej bazaj deziroj de ĉiu homo. Kiam mi havas ian turmentan zorgon, aŭ suferon, se mi povas paroli pri ĝi al iu, kiu aŭskultos min kaj reagos komprene, mi sentos min helpata, okazos ia kundivido de la zorgo aŭ de la sufero, tiel ke mi ne plu sentos min sola, mi fartos pli bone kun ĝi. Kiam bebo suferas kaj krias, tre ofte, pro nekomprene, la reago de la apuda plenkreskulo mistrafas, aŭ tute ne venas reago, krom, survizaĝe, esprimo de senhelpeco. Sed kiam la infaneto akiris lingvon, kaj povas diri: „Doloras al mi en la orelo”, la reago de la plenkreskulo estas tute alia. Okazas vera komunikado, kiu ŝanĝas la vivon. Tial ke tiu komunikado plej ofte kaj plej save disvolviĝas kun la patrino, la emocia etoso de la koncepto „lingvo” inkluzivas la sentojn pri ŝi. Pro tio la plimulto el la lingvoj diras „patrina lingvo”, kiam fakte temas pri la gepatra aŭ la media lingvo.

Fakte, akiri lingvon, estas io tute banala. Tio okazas laŭ la normalaj vojoj de ĉia lernado. Estas nenio pli mistika en lingvoakirado ol en la asimilado de la kapablo regi aŭtomobilon. Tamen estas grandega diferenco inter la du. Pro la

aĝo. Kiam ni lernas uzi aŭtomobilon, ni scias, ke ni lernas, kaj ni jam scias multegon pri la arto lerni, ĉar ni vizitadis lernejon multjare kaj lernis multon pri lernado. Sed kiam ni akiras la gepatran lingvon, ni absolute ne scias, ke ni lernas. Ni do vivas la aferon kiel miraklan. Antaŭe ni ne povis klare komuniki. Nun ni povas esprimi nin. Jen miraklo, kiu ŝanĝas la tutan vivon. Pro tiuj cirkonstancoj, en kiuj ni akiras lingvon, lernante sen scii, ke ni lernas, ke disvolviĝas tute banala lernprocezo, la lingvo fariĝas io sankta, io fea, io fabela, io mita. Io, kio situas ekster la kampo de racio. Io, pri kies deveno ni scias nenion. Por la plejprofundo de nia animo, lingvo estas donaco de la dioj, donaco supernatura. Neniu homo rajtas ŝanĝi ĝin. Neniu rajtas libervole kaj racie enmiksi sin en ion lingvan.

Vidu, kiel emocie la homoj reagas, kiam aperas propono ŝanĝi la ortografion. Rigardu atente la argumentojn, kaj vi vidos, ke nenio vere racia intervenas tie. Temas simple pri emocioj, la emocioj, kiujn ĉiam vibrigas la koncepto „lingvo”.

Kaŝita aŭtoritata mesaĝo

Tiu kerna sento pri lingvo kiel io mita, donita de la dioj, kaj do sankta kaj netuŝebla estas la plej kerna ero de la emocia aŭro de la koncepto „lingvo”. Al tiu kerno aldoniĝas la fakto, ke la koncepto „lingvo” elvokas la plej unuajn rilatojn en la familio, ĉefe tiujn kun la patrio. Sed super tiuj du tavoloj alvenas tria: la rilato kun aŭtoritato. En la transdono de lingvo al infanoj, estas kaŝita mesaĝo, kiujn oni praktike neniam eksplicitas. Kaj tiu mesaĝo estas terure diktatora.

Fakte ĝi diktas la respektivan situacion de infano kaj plenkreskulo en la so-

cio. Kiam infano parolas neĝuste, oni korektas ĝin, almenaŭ ek de kiam ĝi vizitadas lernejon. Se oni ne korektas ĝin, oni ridas aŭ mokus, aŭ ridetas signife. Kia ajn la reago, ĝi sentigas al la etulo, ke, kiam ĝi uzas tian formon, diferencan de la gramatike aŭ vortare ĝusta, ĝi troviĝas ekster la normo. Se eta franclingvano diras „plus bon”, oni diras al li: „Ne tiel oni diras, oni diras „meilleur””. Eble ankaŭ en la germana oni ne rajtas diri „mehr gut” aŭ „guter” aŭ „gueter” kaj verŝajne infanoj uzas tiajn formojn. Tiam oni ilin korektas per frazo kiel: „Ne tiel. Oni diras „besser””.

Kion tio signifas por la profundo de la psiko? Tio transdonas kaŝitan mesaĝon, jene: „Ne fidu vian spontanen, naturan tendencon, kiu igas vin ĝeneraligi lingvan trajton, kiun vi rimarkis. Ne fidu vian logikon. Ne fidu la racion. Ne fidu viajn refleksojn, vian instinkton. Ne fidu vin mem. Obeu nin, eĉ se nia sistemo estas absolute neracia, malsaĝa.”

Por la infanoj ja la lingvo estas esence komunikilo. La unua ŝtupo en ilia pensado do estas: „Se oni komprenas min, estas en ordo. Lingvo ja estas farita por ke ni interkompreniĝu”. Sed la reagoj de la medio pli kaj pli sendas la mesaĝon: „Lingvo ne estas io elpensita por interkompreniĝi. Lingvo estas kampo, en kiu oni lernas konformigi sin al la arbitraj, neklarigeblaj postuloj de la grandularo.” En lingvo estas tabuoj, kiujn neniu povas pravigi. Se infano, kiu volas esprimi la ideon „li venis” diras „er komte”, „il a venu”, „he comed”, oni atentigas ĝin, ke ĝi devus diri „er kam, il est venu, he came”. Se tiam ĝi demandas: kial? Ne eblas doni al li racian respondon. Oni povas nur diri: ĉar estas tiel. Kaj tio

subkomprenigas, ke la lingvo estas io regata de nekompreneblaj leĝoj, neniam klarigataj, kiuj radikas en la pratempo. Respekto al la praavoj aŭ al la dioj, kiuj donis la lingvon, estas pli grava ol logiko, ol racio, ol tendencoj spontanaj, instinktaj, do ol individua homa naturo.

Esperanto fuŝas ĉion ĉi. Ĝi naskiĝis antaŭ ne tre longe. Tio estas sakrilegio. Lingvo ne rajtas esti juna. Lingvo estas io sankta transdonita de la praavoj aŭ de la dioj, ne io, kio povas estiĝi nuntempe. Kaj oni diras, ke tiu lingvo ne havas esceptojn, tio estas krimo! Se oni povas sekvi sian naturon, sian logikon por esprimi sin, kio restos el la aŭtoritato de la prauloj? Tial Esperanto kaŭzas terurajn timojn en la profundo de la psiko. Ĝi riskas perdiĝi al nia gepatra lingvo ĝian mitan, sanktan, fean karakteron. Ĝi reletivigas ĝin, dum viglas emocia bezono, ke la gepatra lingvo estu io absoluta. Necesas ĉiarimede haltigi ĝian disvastigon. Kaj necesas ĉiarimede agi, por ke oni ne esploru pri ĝi. Oni eble vidus, ke lingvo ne estas tio, kion ni kredas, kaj tiel oni subfosus la bazon de la sociaj rilatoj. La afero estas tro emocia, por ke oni akceptu trankvile, objektivite, science studi ĝin. Kaj trankvile, objektivite studi la reagojn al ĝi.

Monstro

Krome, Esperanto aperas kiel monstro, ĉar oni diras, ke ĝin kreis unu viro. Alivorte, ĝi havas patron, sed ne patronon. Ĝi estas la monstra produktaĵo de iu soleca perversulo. Al tiu ideo kontribuas multaj difinoj, troveblaj en vortaroj, enciklopedioj, prilingvaj libroj aŭ Esperantistaj informiloj, laŭ kiuj „Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887. Fakte,

Esperanto ne kreiĝis en 1887. En 1887 aperis semo de lingvo, kiu dum multaj jaroj antaŭe kreskis kaj transformiĝis en la menso de Zamenhof kaj sur liaj kajeroj. Post tiu longa procezo, kiu estas komparebla al la procezo per kiu laŭgrade kreiĝas semo en planto, la projekto publikiĝis, tio signifas, la semo estis ĵetita. Sed tiu semo povis iĝi io vivanta nur, se grundo akceptis ĝin. Kaj tiu grundo estas la patrino de Esperanto, tio estas la komunumo de tiuj unuaj vastkoraj idealistoj, kiuj akceptis la semon, kaj provizis ĝin per la medio, en kiu ĝi povis kreski, transformiĝi kaj fariĝi io sufiĉe vivkapabla por vivteni sin sendepende de iu ajn individuo.

Esperanto, kia ni uzas ĝin nun, ne estas la verko de Zamenhof, ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis surbaze de la projekto de Zamenhof per jarcento da konstanta uzado inter homoj ege diversaj. Ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis tute nature, per uzado, per verkado, per alterno de proponoj kaj kontraŭproponoj, plej ofte nekonsciaj. Ĝi ne estas monstro, kiun estigis iu homo sola, ĝi havas patron, jes ja, mirindan patron, patron, kiu sukcesis meti en ĝin nekredeble taŭgan vivpotencialon, sed ĝi havas ankaŭ patronon, kiu flegis ĝin ame, kaj kiu, multe pli ol la patro sola povis, donis al ĝi vivon.

Faktoj estas pli obstinaj ol paroloj

Vi vidas, ke la psikologiaj aspektoj de Esperanto, kaj de la monda lingvoproblemo, estas multe pli kompleksaj ol oni unuavide imagus. En la psiko de la plej multaj individuoj troviĝas terura rezisto al la ideo mem de lingvo internacia. Pro tiu rezisto, preskaŭ neniu en la politika, socia kaj intelekta elito akceptas serene

esplori la aferon. Kaj tamen ĝi progresos. Similaj kazoj de rezisto al io pli bona, pli oportuna, pli demokratia abundas en la historio.

Plej tipa ekzemplo estas la rezisto en Eŭropo, kontraŭ la ciferoj, kiujn ni nun uzas, la hindaj / arabaj ciferoj: ankaŭ ilin la intelekta elito (kaj ne nur ĝi) sentis sakrilegio kontraŭ la romiaj ciferoj ĝis tiam uzataj. Mi estas konvinkita, ke Esperanto estos ĝenerale akceptita iam. La patologio ne eterne estos pli forta ol la kuracaj fortoj, ankaŭ kiuj agas en la socio. Inter tiuj kuracaj fortoj estas la pli kaj pli bona kompreno de la fenomeno Esperanto fare de lingvistoj, ekzemple, kaj de multaj aliaj personoj. Estas ankaŭ la postuloj de la realo. Kiel diris Lincoln oni povas kaŝi la veron al parto de la publiko dum parto de la tempo. Oni ne povas kaŝi la veron al la tuta publiko dum la tuta tempo.

Esperanto, se oni komparas ĝin al ĉiuj aliaj rimedoj intergente komuniki, estas objektivite la plej bona, per tre granda distanco, por ĉiuj kriterioj. Faktoj estas pli obstinaj ol ideoj. La rezisto plu daŭros kaj estos akra, jes ja, certe, eĉ se nur ĉar oni povas percepti ion nur kiam oni estas tiurilate preta, tiel ke, nuntempe, multaj homoj simple ne aŭdas, kion vi diras pri Esperanto: ilia menso ne estas preta, do viaj frazoj preterpasas sen penetri ĝin. Jes, la rezisto plu estos forta. Sed, kedu min, ĝi ne povos superi. La faktoj venkos. Vero venkos. Esperanto venkos.



Noto pri la aŭtoro

Svisa psikologo kun forta intereso pri lingvoj, diplomito de la Interpretista Lernejo de Ĝeneva Universitato, Claude PIRON (Namur, 1931) estis tradukisto en UN (Novjorko) de 1956 ĝis 1961 (francen el la angla, ĉina, hispana kaj rusa).

Li poste laboris ok jarojn en Monda Organizo pri Sano, i.a. en Orienta Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969 en la ĝeneva regiono (de 1999 en Gland, Svislando). Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakko de Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Lia ĉefa nuna aktiveco, krom la psikoterapia praktikado, estas profesie trejni junajn psikoterapiistojn, per kontrolo de ilia laboro kaj partopreno en trejnaj seminarioj. Li ofte prelegas pri psikologiaj problemoj, ĉefe en rilato kun la spirita vivo, aŭ (malpli ofte) pri internacia komunikado kaj Esperanto.

Lia verko *Le défi des langues* („La lingva defio”), kiu estas iom psikanalizo de internacia komunikado, estis eldonita ĉe L’Harmattan (Parizo) en 1994. Li publikigis en Esperanto ok romanojn, plurajn novelarojn, poemaron kaj kantokasedon. Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado, kaj pri psikologio. Li aŭtoris aŭ kunaŭtoris tri franclingvajn librojn pri psikologiaj temoj.

(Biografia noto estas prenita el la oficiala ttt-paĝaro de la aŭtoro:

www.claude-piron.ch. Ni rekomendas viziti la paĝaron, kie vi povas trovi aliajn, interesajn kaj valorajn, materialojn).

Czesław Baranowski

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio EN

Tiu ĉi prepozicio, tre ofte uzata en diversaj situacioj, estas montranta:

1. **Internan pozicion de io aŭ iu** (ne necesas kompleta enfermiteco, povas esti nur parte interna pozicio). **Ekz.:** **En** la kandelingo estis brulanta kandelo (ĝi estis nur parte en la ingo). **En** la ĉambro sidis nur kelke da homoj. Inter ili troviĝis unu virino **en** funebra vesto. Ŝia edzo dronis **en** la maro. Granda malĝojo speguliĝis **en** ŝiaj okuloj. Ŝi sidis senmove **en** sia fotelo, kaŝinte la vizaĝon **en** la manoj.

RIMARKOJ:

a) Estas diferenco inter la frazoj: Li kuŝas **en** la lito (= li kuŝas **sub** la litkovraĵo) kaj: Li kuŝas **sur** la lito (= li kuŝas sur la litkovraĵo).

b) Ni ankaŭ uzas **en** dirante pri lokoj, kiujn oni rigardas kiel spacojn, kvankam ili estas surfacoj. **Ekz.:** **En** la proksima arbaro kreskas multaj fungoj. Mi konas nenion **en** via urbo, sed mi havas du geamikojn **en** via lando. La rusoj loĝas **en** Rusujo kaj la poloj **en** Polujo (= Pollando). Adamo kun Eva vivis iam feliĉe **en** paradizo. Esperanto estas nun vaste konata **en** la tuta mondo.

2. **Moviĝon de io aŭ iu al difinita loko** (kune kun **en** aperas direkta N-finaĵo). **Ekz.:** La hundo kuras **en** la domon (= La hundo estis ekstere, sed nun kuras al la interno de la domo). Gelernantoj iris

en la korton por ludi pilkon. Dum ventego sablero falis **en** mian okulon. Multaj birdoj flugas aŭtune **en** pli varmajn landojn. La edzo konsilis al sia edzino iri **en** la dormoĉambron kaj li verŝis vinon el la botelo **en** la glasojn. Fortrinkinte la vinon ili ambaŭ iris **en** la liton. Raportisto longe parolis **en** mikrofonon kaj poste li metis sian notaĵkajeron **en** la poŝon.

3. **La tempodaŭron, interne de kiu okazas la ago kaj tempolongon necesan por fari ion.** **Ekz.:** Tio okazis **en** dimanĉo antaŭtagmeze. **En** la tago ni laboras kaj **en** la nokto ni dormas. Multaj homoj laboras 48 horojn **en** ĉiu semajno. **En** somero gelernantoj volonte biciklas kaj **en** vintro ili glitkuras kaj skias. Mi vizitos vin **en** la venonta jaro. **En** la daŭro de unu semajno oni povas multon fari. Mi tralegis vian libron **en** kvar tagoj. Li ellernis Esperanton **en** tri monatoj.

4. **La staton, kiu karakterizas objekton.** **Ekz.:** Li estas **en** amikaj rilatoj kun ŝi kaj mi vivas kun li **en** granda amikeco. Ni tre ofte interparolas **en** Esperanto. Multaj senlaboruloj vadas **en** ŝuldoj aŭ vivas **en** mizero. Dangere estas lasi gelernantojn **en** plena libereco. Ne ĉiu scipovas paroli **en** akceptebla maniero. Ŝi ne sukcesis malfermi la pordegon **en** plena larĝo. Ŝia edzo estas ofte **en** kolera humoro. Lia pulso ne ĉiam **en** takto batas. **En** la vivo ni bezonas multe da sa-

no, feliĉo kaj amo. Mia bona amiko mortis **en** la aĝo de 85 jaroj.

5. Unu el la cirkonstancoj, inter kiuj fariĝas la aĝo. **Ekz.:** Mi salutis ŝin **en** (je) la nomo de mia edzino. La knabino mortis **en** turmentoj. Renkonte al la pastro iris virino **en** ornamo de monaĥino. Junulino kuris malsupren **en** (per) kelkaj saltoj. Ŝiaj haroj estis kunvolvitaj **en** (per) belaj plektoj. Esperantistoj de la tuta mondo vivas **en** konsento kaj agas **en** ĉies intereso.

6. La finan staton de ŝanĝiĝinta objekto, la rezulton de aliĝo. **Ekz.:** La patro dishakis la arbon **en** malgrandajn pecojn. Senlaboreco ofte kondukas homojn **en** mizeron. Lia malkaŝemeco aliformiĝis **en** arogantecon. Instruisto metis la knabon **en** angulon de la klasoĉambro (por puni lin). Pollando estas dividita **en** 16 vojevodiojn. Oni tradukis jam multajn polajn librojn **en** Esperanton.

RIMARKO: Oni povas ankaŭ uzi la prepozicion **en** en aliaj situacioj. **Ekz.:** sukcesi **en** io, agi **en** ies intereso, havi plezuron **en** io, diferenci **en** la detaloj, paroli **en** la nomo de iu, fari ion **en** okazo de neceso, vidi **en** iu iun (anĝelon, diablon). L. L. Zamenhof vidis **en** Esperanto la estontan lingvon de la homaro.

Vortfarado kun la prepozicio EN:

- ❖ **ena** (= interna). **Ekz.:** La ena flanko de la domo vekis admiron de gastoj.
- ❖ **ene** (= interne). **Ekz.:** Ene de la domo regis gajeco kaj bonhumoro.
- ❖ **enen** (= al la interno). **Ekz.:** La infanoj kuris enen por ion manĝi kaj trinki.

La prepozicio EN funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:

- ❖ **enhavi** (= havi ene, havi en si). **Ekz.:** La libro **enhavas** 20 ĉapitrojn.

- ❖ **enteni** (= teni interne de io, aŭ de si). **Ekz.:** **Enteni** tigran en kaĝo.
- ❖ **enfermi** (= teni fermita en io). **Ekz.:** Via manĝaĵo estas enfermita en fridujo.
- ❖ **eniri** (= iri enen, internen de iu loko). **Ekz.:** Li **eniris** en la ĉambron.
- ❖ **enspezi** (= ricevi monon). **Ekz.:** Mi jam **enspezis** la pension (emerituron).
- ❖ **enkonduki** (= konduki internen de io). **Ekz.:** **Enkonduki** iun en la domon.
- ❖ **enmeti** (= meti en ion). **Ekz.:** Mi jam **enmetis** ĉiujn librojn en mian ŝrankon.
- ❖ **enmiksi, enplekti, enporti, enskribi, enŝovi, enŝteli, entranĉi, envolvi,**
- ❖ **enkorpigi** (= doni ian, konkretan formon al io abstrakta),
- ❖ **enbuŝigi, enkaŝigi, enterigi, entombigi, endormigi, enmanigi, envagoniĝi, enŝipiĝi, ennebuliĝi, ennoktiĝi, enteriĝi, enamigi ktp.**

RIMARKO: Laŭ la aŭtoroj de PAG: „La strukturo de **enamiĝi** (iĝi enama) klare montras, **ke ĝia** nerekta objekto ne povas esti **en iun**, sed **al iu** aŭ **je iu**”. Ludoviko Zamenhof skribis tamen: „Oni diras al mi, ke vi enamiĝis **en min**”.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio EN el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:

- ❖ En akvo malklara oni fiŝkaptas facile.
- ❖ En arbaro sidas kaj arbojn ne vidas.
- ❖ En ĉiu aĝo devas kreski la saĝo.
- ❖ En ĉiu malbono estas iom da bono.
- ❖ En ĉiu objekto troviĝas difekto.
- ❖ En ĉiu transloĝiĝo estas parto de ruiniĝo.
- ❖ En feliĉo ne fieru, en malfeliĉo esperu.
- ❖ En fremdan vazon ne ŝovu la nazon.

AdE – Oficialaj Informoj

La Akademio de Esperanto ĵus voĉdone aprobis la jenan raporton de la Sekcio pri prononcado (33 akademianoj voĉdonis jese, 5 nee kaj 1 sindetene).



Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tian anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.

Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.

Geraldo Mattos

Prezidanto de la Akademio de Esperanto

La ĉi-antaŭa Akademia deklaro estas kompletigo de la jena rezolucio publikigita jam en 1982 („Aktoj de la Akademio III 1975-1991”):

Pri niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Lu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: „Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ povas anstataŭi ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u”.

Por la Akademio, ties Prezidanto,

William Auld



La estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la koncernata direktoro de la Sekcio pri prononcado: Renato Corsetti, Sekretario, Probal Dasgupta, Vicprezidanto kaj Direktoro de la Sekcio, Brian Moon, Vicprezidanto, Geraldo Mattos, Prezidanto.

Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro de UEA

UEA — nia monda organizaĵo

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas la plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo. Ĝi estas ankaŭ la plej grava Esperanto-organizaĵo. Kvantam nur parto de la esperantistoj de la mondo membras en UEA, pli-malpli ĉiuj esperantistoj rekonas, ke UEA reprezentas ankaŭ ilin. Ankaŭ por ne-esperantistoj UEA estas la reprezentanto de la esperantistaro. Tial Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko starigis oficialajn rilatojn kun UEA kaj invitas reprezentantojn de UEA al siaj kunsidoj kaj petas komentojn de UEA pri siaj dokumentoj, klarigas Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA. En sia artikolo li rakontas pri la historio kaj nuntempo de UEA.

UEA naskiĝis la 28^{an} de aprilo 1908 en Ĝenevo, Svislando. Unu el ĝiaj fondintoj estis la 19-jara junulo Hector Hodler, kiu fariĝis la unua direktoro de UEA. Unu jaron pli frue li jam transprenis la revuon Esperanto, kiu estis fondita en 1905. Ĝi fariĝis oficiala organo de UEA. Hodler transprenis ankaŭ la reton de „konsuloj”, kiu estis kreita en 1906. Poste la konsuloj ricevis la nomon „delegitoj”. Ankaŭ nuntempe la Delegita Reto estas unu el la plej famaj servoj de UEA.

Delegitoj respondas al plej diversaj informpetoj de membroj de UEA kaj iliaj adresoj aperas en la Jarlibro (en Jarlibro 2006 troviĝas 1789 delegitoj en 99 lan-

doj). La Jarlibro estas ankaŭ en Interreto, reto.uea.org, kie membroj de UEA povas uzi ankaŭ aliajn servojn, kiuj ne estas eblaj per la papera Jarlibro.

Ĝuste la ebligado de praktikaj servoj per Esperanto estis unu el la celoj de Hodler, kiam li fondis kaj ekgvidis UEA. Li havis ankaŭ idean celon: „krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj”. Ekde la komenco ĝis hodiaŭ idealismo kaj praktikismo iris man-en-mane en UEA.

Komence nur individuoj povis esti membroj de UEA. Por kunlaboro inter landaj Esperanto-asocioj estis Internacia Centra Komitato, kiu organizis i.a. Universalajn Kongresojn. En 1933 estis farita Interkonsento de Kolonjo, per kiu UEA fariĝis komuna organizaĵo de landaj asocioj (tiutempe oni nomis ilin „naciaj societoj”) kaj de individuaj membroj (oni nomis ilin „aktivaj membroj”). Tio estas la baza strukturo ankaŭ de la nuna UEA.

En 1936 okazis krizo. Ekde la komenco la Centra Oficejo troviĝis en Ĝenevo, sed pro la altaj kostoj tie oni volis movi ĝin al Londono. La svisoj kontraŭis tion. Tiam preskaŭ ĉiuj landaj asocioj kaj plimulto de la membroj fondis novan asocion kun la nomo Internacia Esperanto-Ligo (IEL). Ĝia sidejo estis en vilaĝo apud Londono. La skismo feliĉe ne daŭris tre longe kaj en 1947 UEA kaj IEL reunuiĝis sub la flago de UEA.

La Centra Oficejo de IEL fariĝis CO de la unueca UEA, sed en 1955 ĝi translokiĝis denove. La situo en kamparo apud Londono estis maloportuna, sed prezoj en la urbocentro estis tro altaj. Oni trovis malmultekostan ejon en la nederlanda havenurbo Roterdamo kaj movis la oficejon tien. Unue la CO estis en luita domo, sed en 1961 UEA aĉetis propran domon en la adreso Nieuwe Binnenweg 176. En tiu domo la CO troviĝas ankaŭ nun.

UEA konsistas el individuaj membroj kaj el aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj. En la jaro 2005 estis 6111 individuaj membroj en 113 landoj. Nuntempe 67 landaj asocioj estas aliĝintaj al UEA. Korea Esperanto-Asocio estis akceptita en la UEA-familio en 1976. Ankaŭ grandaj fakaj asocioj povas aliĝi al UEA. Nun 7 fakaj asocioj estas aliĝintaj: blinduloj (LIBE), fervojistoj (IFEF), filatelistoj (ELF-AREK), instruistoj (ILEI), komercistoj (IKEF), medicinistoj (UMEA) kaj sciencistoj (ISAE). Fakaj asocioj, kiuj estas tre malgrandaj aŭ kiuj ne estas neŭtralaj rilate politikon aŭ religion, ne povas aliĝi al UEA, sed ili povas fari kontrakton pri kunlaboro kun UEA. Nun estas 34 tiaj asocioj. Informoj pri la landaj kaj fakaj asocioj troviĝas en la Jarlibro.

La aliĝintaj asocioj partoprenas en la gvidado de UEA pere de la Komitato, kiu estas la supera organo de UEA. Se ili havas pli ol 100 membrojn, ili rajtas elekti po unu membron al la Komitato. Tiujn membrojn oni nomas „komitatanoj A”. Nun la korea komitatano A estas Prof. D-ro Lee Young-Koo. Asocioj, kiuj havas malpli ol 100 membrojn, elektas observanton, kiu ne havas voĉdonrajton en la Komitato. Individuaj membroj estas reprezentataj de „komitatanoj B”. Por ĉiu

milo da individuaj membroj estas unu komitatano B.

La individuaj membroj elektas ilin per poŝta voĉdonado. Unu el la komitatanoj B estas Prof. D-ro Lee Chong-Yeong. La komitanoj A kaj B rajtas kompletigi la Komitaton ankaŭ per aparte kompetentaj movadanoj. Ili fariĝas „komitatanoj C” kaj ilia nombro rajtas esti maksimume kvarono de la nombro de komitatanoj A kaj B. La nuna Komitato estis elektita en 2004. En ĝi estas 60 komitatanoj A, 6 B, 10 C kaj 10 observantoj. La oficperiodo de la Komitato estas tri jaroj. Do, en 2007 nova Komitato estos elektita.

La Komitato kunsidas dum Universalaj Kongresoj. Tiam ĝi aprobas la agadraporton de la Estraro, financajn raportojn kaj buĝeton por nova jaro. Ĝi faras ankaŭ multajn aliajn decidojn, ekzemple distingas meritplenajn movadanojn per honora membreco de UEA. Nun vivas 64 honoraj membroj. Inter ili estas du eminentaj koreoj: S-ro Han Moo-hyup kaj Prof. D-ro Lee Chong-Yeong.

Ĉiun trian jaron la Komitato elektas Estraron de UEA. La ĉefa tasko de la Estraro estas plenumi la agadplanojn de la Komitato. La Estraro havas kutime 6 ĝis 8 membrojn. La plej grava membro estas la Prezidanto de UEA. Ekde 2001 D-ro Renato Corsetti el Italio estas la Prezidanto. La unua koreo, kiu atingis tiun plej altan postenon de la Esperanto-movado, estas Prof. D-ro Lee Chong-Yeong, kiu estis Prezidanto 1995-1998. Li estis populara kaj aktiva prezidanto. Li energie klopodis por antaŭenigi Esperanton kiel rimedon de lingva demokratio en internaciaj rilatoj.

Li iniciatis Nitobe-simpozion, kiu okazis unuafoje en la UK en Prago en 1996

kun reprezentantoj de Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kiuj diskutis pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj. (La simpozio estis nomita laŭ D-ro Nitobe Inaze, iama asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj. Li ĉeestis kiel observanto la UK en Prago en 1921 kaj faris favoran raporton pri la funkciado de Esperanto). Prezidanto Lee iniciatis ankaŭ la Manifeston de Prago, kiu koncize kaj klare prezentas la celojn de la nuntempa Esperanto-movado. Miloj da esperantistoj subskribis la Manifeston.

Apud la Komitato kaj Estraro laboras multaj komisionoj por specialaj kampoj. Ege konata estas Komisiono pri la Azia Esperanto-Movado (KAEM), kiu plifortigas la kunlaboron inter aziaj Esperanto-organizaĵoj kaj klopodas disvastigi Esperanton en landoj, kie Esperanto estas malforta. Ĉiun duan jaron KAEM organizas Azian Esperanto-Kongreson, kiu laste okazis en Katmanduo, Nepalo, en 2005. En 2008 ĝi okazos en Bangaloro, Barato.

La Centra Oficejo de UEA (CO) jam estis menciita supre. Nuntempe ok oficistoj laboras tie. Ilia estro estas la Ĝenerala Direktoro. Ofte ili ricevas helpon de volontuloj, kiuj venas al la CO por mallonga periodo. La CO plenumas plej diversajn administrajn kaj praktikajn taskojn. Tie oni administras la kotizojn, adresojn kaj aliajn informojn de la membroj kaj zorgas pri la financa librotenado. La CO administras ankaŭ t.n. UEA-kontojn. Ĉiu membro rajtas havi konton ĉe UEA, kiu faciligas pagojn al aliaj membroj, asocioj, libroservoj, gazetoj ktp.

En la CO funkcias ankaŭ granda libroservo, kiu vendas librojn, diskojn kaj aliaj varojn al esperantisto en la tuta mondo.

Nuntempe estas pli facile esti kliento de la libroservo, ĉar ĝia katalogo troviĝas en Interreto, katalogo.uea.org, kaj oni povas mendi ĉion rete. UEA ankaŭ mem eldonas librojn. Kutime ili estas verkitaj de aŭtoroj ekster la CO, sed la CO preparas ilin por presado. Eble la plej fama Esperanto-libro estas la Jarlibro de UEA. Ĝi estas redaktata en la CO kaj ĉiuj individuaj membroj ricevas ĝin. La redaktoro de la monata revuo *Esperanto* vivas kaj laboras ekster la CO, en Slovakio, sed pluraj tekstoj en ĉiu numero estas verkitaj de oficistoj de la CO, kiuj ankaŭ provlegas la revuon antaŭ presado.

En la CO laboras ankaŭ Konstanta Kongresa Sekretario (KKS). Li estas la ĉefa organizanto de Universalaj Kongresoj, kiuj okazas ĉiujare en malsamaj landoj. La unua UK okazis en 1905 en la franca urbo Bulonjo-ĉe-Mar. En 1994 UK okazis en Seulo kun 1776 aliĝintoj. En 2006 ĝi estis en Florenco, Italio, kaj en 2007 ĝi okazos en Jokohamo, Japanio. En 2008 la UK okazos en Roterdamo por festi la 100-jariĝon de UEA. Organizado de UK estas enorma laboro, kiun KKS ne povas fari sola. Liaj ĉefaj helpantoj estas la estraranoj de UEA, oficistoj de la CO kaj la membroj de Loka Kongresa Komitato (LKK). Ĉiu UK havas propran LKK, kiu konsistas el esperantistoj de la kongresa lando. Dum la kongresa semajno laboras ankaŭ pluraj dekoj da helpantoj.

La CO ne estas la sola oficejo de UEA. Ekde 2001 funkcias Afrika Oficejo, kiu unue troviĝis en Togolando kaj ekde januaro 2006 en la urbo Lokossa en Benino. Tie laboras du oficistoj, kies ĉefa tasko estas prizorgi instruadon kaj informadon pri Esperanto en afrikaj landoj. Multe pli malnova estas Novjorka Ofi-

cejo, kiu jam 30 jarojn zorgas pri reprezentado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tie ne estas salajrataj oficistoj, sed la laboro estas farata de volontuloj. En la aliaj urboj, kie UN havas oficejon (Ĝenevo kaj Vieno), UEA ne havas oficejon sed en ambaŭ urboj tri esperantistoj reprezentas UEA ĉe diversaj kunsidoj. En Parizo reprezentantoj de UEA prizorgas la rilatojn kun Unesko.

En la sino de UEA funkcias aparta organizaĵo por junularo. Ĝi estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĉiu membro de UEA, kiu estas malpli ol 30-jara, estas aŭtomate membro de TEJO kaj ricevas ĝian riĉe ilustritan revuon *Kontakto*, kiu enhavas ankaŭ facilajn tekstojn por komencantoj, kaj la novaĵbultenon TEJO tutmonde. La plej fama servo de TEJO nomiĝas Pasporta Servo, kiu provizas vojaĝantajn esperantistoj per senpaga loĝigo. Ĉiujare aperas libreto kun adresoj de gastigantoj. La plej lasta eldono enhavas adresojn de 1320 gastigantoj en 92 landoj. Detalaj informoj pri TEJO troviĝas en ĝia retejo www.tejo.org kaj pri Pasporta Servo en www.tejo.org/ps.

La supra priskribo ne estas kompleta prezento de la tuta strukturo kaj agado de UEA. Se vi volas legi pli vaste, bv. konatiĝi kun la retejo de UEA, www.uea.org. Fine mi devas menciiti la celojn, kiujn UEA klopodas antaŭenigi per sia agado. Ili estas menciitaj en la Statuto de UEA, kies nuna versio estis akceptita en 1980:

- a) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;

- c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Ĉu ankaŭ vi subtenas tiujn celojn? Se jes, mi varme bonvenigas vin fariĝi membro de UEA!

(La artikolo originale aperis en la korea revuo *La Lanterno Azia* en decembro 2006. Ni publikigas ĝin kun la permeso de la Aŭtoro).



Esperanta ekspozicio en Szczytno

La 15^{an} de decembro 2006, je la 11^a horo, okazis malfermo de la Esperanta ekspozicio en Pedagogia Biblioteko en la urbo Szczytno.

Iniciatis ĝin la loka samideanino Kazimiera Dąbrowska, direktorino de Biblioteko afable konsentis, kaj esperantistoj el Olsztyn helpis aranĝi la ekspozicion.

En la ekspozicio, kiu daŭros ĝis la 28^a de februaro 2007 oni povas rigardi:

- portreton de Ludoviko Zamenhof pentritan de kolegino Joanna Rostańska — artistino el Olsztyn, nuntempe loĝanta en Meksikio
- fotojn prezentantajn: Ludovikon Zamenhof en diversaj jarvivoj, lian naskiĝdomon kaj monumenton en Bialistoko kaj tombon en la juda tombejo en Varsovio
- famajn romanojn, novelojn, poemojn tradukitajn en Esperanton

- lernolibrojn kaj vortarojn
- diversteman Esperantan gazeton
- materialojn, fotojn, artikolojn, kronikojn prezentantajn la Esperantistan movadon en la urbo Szczytno.

Dum la solena malfermo koleĝino Elżbieta Leonowicz–Frenszkowska — prezidantino de Varmia–Mazuria Societo de Esperantistoj en Olsztyn rakontis pri la vivo de Zamenhof, kaj koleĝino Kazimiera Dąbrowska prezentis informojn pri sia agado en Szczytno rilate al Esperanto.

Knabinoj el la Gimnazio n-ro 2 en Szczytno prezentis mallongan artan programon, dum kiu ili rakontis pri Antoni Grabowski, kies nomon antaŭ pli ol tridek jaroj havis la skolta teamo en la bazlernejo en Szczytno. Unu el knabinoj recitis en la lingvo Esperanto la komencan fragmenton el la poemo de Adam Mickiewicz „Sinjoro Tadeo” majstre tradukitan de Antoni Grabowski. Fine knabinoj recitis la Esperantan himnon.

La artan programon preparis instruistino Stanisława Danuta Wiśniewska, kiu antaŭ jaroj lernis Esperanton kaj apartenis al la supre menciita skolta teamo.

La aranĝon partoprenis kelkdekaj spektantoj kaj inter ili junularo el la loka mezlernejo.

Elżbieta Frenszkowska



Ago-Semajno 2006 en Nowy Sącz Pollando

De la 27^a de decembro 2006 ĝis la 1^a de januaro 2007 nia urbo gastigis pli ol 180 Esperantistajn gejunulojn. Ili venis el Alĝerio, Belgio, Bjelorusio, Bosnio, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Francio, Britio, Hi-

spanio, Hungario, Italio, Israelo, Kroatio, Litovio, Nederlando, Pollando, Portugalio, Rusio, Slovakio, Svislando, Ukrainio.

En la programo okazis la interkona vespero, folkloraj regionaj dancoj kaj kantoj, aŭtobusa ekskurso prezentanta la malnovan lignan arĥitekturon de urboj, urbetoj, kaj preĝejoj katolikaj kaj grekokatolikaj. Oni vizitis muzeon de regionaj antikvaĵoj kaj tre malnovan monaĥejon en Stary Sącz (Malnova Sonĉo). Estis vizitata tre malnova, iam grekokatolika, preĝejo en la vilaĝo Powroźnik (Povrozniko). Sekve gejunuloj vizitis kuraclokon Krynica (Krinico), faman pro sanigaj mineralaj fontoakvoj.

La ekskurso finiĝis en la vilaĝo Kamienka, kie en abelujaro estas produktataj diversaj mieloj, drinkaj mieloj (medoj), mielodevenaj kuraciloj kaj estas bredataj abelaj reĝinoj.

Dum vesperoj la junularo dancis kaj aŭskultis koncertojn. Okazis festivalo de lingvoj kaj kulturoj. La gastoj prezentis siajn naciajn kantojn kaj muzikon. En la sama vespero estis prelego pri nia vojevodio.

Pantomimo prezentata de la lokaj gimnazianoj kortuŝis ĉiujn. Ili ludis spektaklon titolitan „Ni naskiĝas por ami”, reĝisoritan de profesoro Barbara Margasińska.

Junaj esperantistoj festis la 750^{an} jubileon de la urbo Stary Sącz (Malnova Sonĉo) kaj estis gastoj de la urba estraro. Ili ludis ĉe fajrujo kaj dancis en adaptita „Grenejo”, ĉe folkloro orkestro.

Pro manko de la neĝo, planata veturo sur sledoj tirataj de ĉevaloj ne povis okazi. Anstataŭ ĝi, la gastoj veturis sur ĉevalaj ĉaroj ĉe akompano de popolaj muzikistoj.

Junaj geesperantistoj lasis tie ĉi bonajn, gajajn memorojn. Ni esperas, ke same ili memoros nian regionon.

Ĉe la organizado helpis Sandecia Universitato de Tria Aĝo kaj lokaj Esperantistoj. En la loka gazetaro aperis kelkaj artikoloj, priskribantaj la okazintaĵon.

Aĝo-Semajnon finance kaj per varoj apogis vojevodia kaj loka estraroj, ankaŭ lokaj komercistoj.

Esperanto-Klubo Nowy Sącz



Oblata renkontiĝo en Varsovio

La 20^{an} de januaro 2007 okazis en Varsovio oblata renkontiĝo. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 30 personoj el Varsovio kaj aliaj lokoj. La S-tan meson en Esperanto kuncelebris pastro Roman Forycki kaj pastro Stanisław Stolz. Poste la partoprenantoj transiris al la salonego, kie post la mallonga preĝo gesamideanoj rompiĝis je oblato, interŝanĝis la bondezirojn, kantis la kristnaskajn kantojn, prezentis la poemojn pri Kristnaska periodo kaj aliajn, interparolis, aŭskultis informojn inter alie pri Ekumena Kongreso en Pelplin ktp.

Ne mankis ankaŭ la trinkaĵoj kaj dolĉaĵoj. Ankaŭ estis ebleco rigardi belan kaj interesan ekspozicion bonege preparitan de s-ro Bohdan Wasilewski, kiu kun edzino Krystyna prizorgis la tutan aranĝon en la gastama klostro de la fratulinoj.

Tre rapide pasis la tempo dum la agrablo, amika kaj frata etoso.

Bogusław Sobol

La Esperantisto de la Jaro 2006

Sendependa internacia magazino „La Ondo de Esperanto” iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ap Fergus (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005).

Ĉi-jare estis proponitaj 21 personoj, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn.

La rezulto de la voĉdonado:

- 1 voĉon ricevis: Peter Balaž, André Cherpillod, Antonio De Salvo, Bharat Ghimire, Albrecht Kronenberger, Hori Yasuo;
- 2 voĉojn: Petr Chrdle, István Ertl, Ilona Koutny, Stefan Maul;
- tri voĉojn: Barbara Pietrzak, Humphrey Tonkin;
- 4 voĉojn: Chuck Smith;
- 5 voĉojn: Peter Zilvar;
- 6 voĉojn: Bertilo Wennergren.

Sveda esperantisto Bertilo Wennergren, loĝanta nun en Koreio, estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2006 pro la „Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko” (PMEG).

Intervjuo kun Bertilo Wennergren aperis en la januara kajero de „La Ondo de Esperanto”.

Pliajn informojn pri la projekto kaj intervjuojn kun ĉiuj antaŭaj laŭreatoj legu rete ĉe: www.esperanto.org/Ondo/Ind-jaro.htm

Sekretario Halina Gorecka



Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare,
eldonkvanto (nakład): 300 ekz.

N-ro (25) 1/2007 — ISSN 0032-2431

redaktas: Tomasz CHMIELIK, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA.
konstantaj kunlaborantoj: Czesław BARANOWSKI, Danuta KOWALSKA,
Teresa NEMERE, Stanisław ŚMIGIELSKI.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME.

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl; retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

tel. (+48) 0602 277 604

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644









Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR (prioritate: 18,00 EUR) pagenda al:

landaj perantoj: (konsultu vian landan organizon);

supra banko-konto: (BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK) kun plena nomo kaj adreso;

UEA-konto: <kazl-s> de Kazimierz Leja. Nepre informu nin pri via pago!

HEJME Eldonejo HEJME proponas:



Libroj eldonitaj de la Eldonejo HEJME, estas mendeblaj rekte en la eldonejo (prefere pere de la retpaĝo: www.hejme.com.pl, kie troviĝas ĉiuj necesaj informoj pri la prezoj, pagmanieroj, ktp.), aŭ per simpla poŝto. Kiel ĉiam, por revendistoj kaj organizantoj de Esperantaj kursoj ni proponas 20%-an rabaton.